

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2012. №4 (210)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, ALEN KRIS, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Mojajev, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2012

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara *Ondo*.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2012.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2012, №4 (210).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 19 марта 2012 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Vortoj de komitatano Z

Hundoj bojas, karavano vojas

Eĉ la kritikantoj de UEA ne neas, ke malgraŭ ĉio ĝi restas la ĉefa Esperanto-organizaĵo. Verŝajne ĝi restos tia ĝis fora futuro. Kvankam ĝia membronombro falis, ĝi tenas la unuan lokon eĉ pli suverene ol iam ajn. Iam SAT estis preskaŭ same granda, sed nuntempe ĝi estas apenaŭ dekono de UEA kaj nenio plu savos ĝin.

Kritikantoj de UEA pravas ĝian gravecon, ĉar alie ne indus ĝin kritiki. Ĉio en Esperantujo gravitas ĉirkaŭ UEA, ĉar tiel granda estas ĝia maso. Kelkfoje kritikantoj fondas propran organizaĵon, kies motoro kutime estas unu homo. Kiam la motoro estingiĝas, ĉu pro morto ĉu pro forvelko de entuziasmo de la motoro mem aŭ ties samideanoj, la rivaloj malaperas. Komuna al ili estas, ke ili ne agnoskas esti rivaloj de UEA. Rivaleco signifas konkurencon, kaj agnoski partopreni en konkurenco signifas agnoski la riskon malvenki kaj perdi la vizaĝon. Ĉar malvenko kontraŭ UEA estas tre verŝajna, estas pli saĝe ne prezenti sin kiel rivalon kaj ripete substreki tion.

Ĉi-jare UEA alvokas atenti la centan datrevenon de Tibor Sekelj. Prave, ĉar Sekelj apartenas al nia panteono. En omaĝaj artikoloj oni mencias ankaŭ lian Instituton por Oficialigo de Esperanto kiel modelon pri informado kaj praktika aplikado de Esperanto. Ĝia slogano estis “Pli bona praktiko ol 100-hora prediko”, ĉar ĝi donis ĉefan gravecon al rekta agado. Antaŭ kvardek jaroj ĝi estis protesto al la politiko de UEA de Ivo Lapenna, kiu pli predikis ol agis laŭ IOE. Sekelj diris, ke “UEA ĉefe laboras por UEA”. Lia kompano Giancarlo Fighiera skribis, ke “UEA limiĝis en tro granda parto al administrado kaj liverado de tradiciaj servoj al la membroj”. Laste komitatano Martin Schäffer, kiu el Meksiko reprezentas Germanion ĉe UEA, ricevis la saman enlumigon kaj delegis sin fondi “Esperanto Internacia” por la vera agado.

Unu post alia opoziciuloj kiel Sekelj kaj Fighiera fariĝis honoraj membroj de la Asocio, kaj aliaj transprenis iliajn refrenojn. En inversa direkto trafikis Lapenna, kiu el prezidanto fariĝis opoziciulo kaj eĉ apostato. Ankaŭ lia Neŭtrala Esperanto-Movado ne transvivis sian fondinton, sed male Lapenna mem transvivis ĝin, dissolvinte ĝin iom antaŭ ol forpasi.

Kurioza formo de opoziciado estas la Esperanta Civito. Ĝi insiste neas esti iel ajn koncernata de UEA aŭ de la Esperanto-movado entute, sed tamen ĝi daŭre subfosas tiun aserton, ĉar en plej surprizaj kuntekstoj ĝiaj laŭtparoliloj referencas al UEA per moko kaj pikoj. Kiel IOE kaj NEM, ankaŭ ĝi turniĝas ĉirkaŭ unu protagonisto. Ŝajnas, ke ĝi nun komencas fronti unuajn simptomojn de ekfalo, kiu pli aŭ malpli frue nepre devis veni. Ĝia rondo de kunlaborantoj ĉiam restis tre malgranda kaj lastatempe suferis perdojn pro forpaso kaj internaj kvereloj. Kun plezuro *Libera Folio* do povis raporti, ke la ĉeforgano de la Civito, *Heroldo de Esperanto*, havas tiel longan malfruiĝon, ke ĝi kvazaŭ tute ĉesis aperi.

Feliĉe UEA ne mortas sed transvivas ĉiujn opoziciojn kaj la plej fuŝajn estrarojn.

Komitatano Z

Sur la kovropaĝo estas foto el la Esperanta biblioteko en la naskiĝurbo de la aŭtoro de Esperanto (vd. p. 20).

Kvar vizioj: Kiel vivi en la ruiniĝanta Esperantio?

de Zbigniew Galor

La kvar voĉojn pri la nuntempa stato de Esperanto, kiuj aperis en *La Ondo*, ne ligas senpera diskuto inter la aŭtoroj, kiuj estas esperantistoj kun signifaj pozicioj en Esperanto: Grigorij Arosev — prezidanto de Rusia Esperantista Unio (REU), Giorgio Silfer — Konsulo de la Esperanta Civito, Trevor Steele — verkisto kaj instruisto, José Antonio Vergara — eksestrarano de UEA. Formo de intervjuo aperas nur kaze de Silfer, la aliaj voĉoj aperas forme de senpera elparolo kiel propraj artikoloj de la aŭtoroj.

Kvar motivoj

Ĉiu el la kvar aŭtoroj specife vidas interrilaton inter la ekstera nuntempa mondo kaj la mondo de Esperanto (kaze de Silfer la ekstera mondo komenciĝas ekster la raŭmista Civito kaj finvenkistoj kunkreas ĝin). Oni povas esprimi la bazajn alirojn kiel kvar motivojn.

Esperanto iĝas nebezonata. — Grigorij Arosev opinias, ke al la mondaj problemoj apartenas ankaŭ la malaltiĝo de la valoro de Esperanto kiel internacia komunikilo. Tio okazas ĉe domino de la angla kaj fulma evoluo de teknologioj. Rezulte, angle oni sufiĉe bone interkomunikiĝas baze, ekzemple, en turismo, sen apliko de Esperanto. Ĝi iĝas nebezonata.

Esperanto valoras nur kiel raŭmismo. — Laŭ Giorgio Silfer Esperantion kreas la Nova Esperantio — Civito (raŭmistoj) kaj la Malnova Esperantio (finvenkistoj). La mondo de finvenkistoj estas en krizo: UEA en krizo de identeco, kaj SAT en agonio. La ĉefa problemo de la tuta Esperanto-medio: nesufiĉa empatio kaj sinergio en interhomaj rilatoj koncernas ankaŭ Civiton. Tamen inter finvenkistoj ĝi estas multe pli rapida kaj granda. La Malnova Esperantio mortas.

Esperanto — pli ol lingvo — regresas. — Trevor Steele, komparante la unuan Esperanto-kongreson en Aŭstralio kaj la jubilean kongreson post cent jaroj, konkludas, ke la mondo ankoraŭ ne estas sufiĉe matura por adopti Esperanton, kiu estas ne nur lingvo, sed

ankaŭ internacia pensmaniero. Esperantistoj sin prezentas kiel mikroskopa parteto de la monda loĝantaro. En la alekstera Esperanto-agado okazas regreso, ne progreso.

Nek finvenkismo, nek raŭmismo — Esperanto kiel plivastismo. — José Vergara esprimas konvinkon, ke ĉefe porimperisma lingvopolitiko kaj la tutmonda merkatiĝo igis la anglan reganta kaj “forprenis” kampojn espere ligatajn antaŭe kun Esperanto (scienco, komerco, turismo). La ideologio de radikalaj finvenkistoj gvidas Esperanton al negala batalo kun la angla, kiel Davido kaj Goljato. Samtempe la ideologio de raŭmistoj ŝajnas skolastike memcentrita en la supozata unikeco de iu “Esperanta kulturo”. Eblas la tria vojo — plivastismo.

Esperanto kaj esperantistoj: marĝenaj kaj ekskluditaj

La bildo de Esperanto kaj esperantistoj, kiun prezentas la motivoj, enhavas: malaltiĝon de la valoro de la lingvo kiel internacia komunikilo, eĉ ĝian nebezonon kompare kun la reganta angla, kiu “forprenis” la lokojn iam rezervitajn por Esperanto; krizon de UEA kaj agonion de SAT; ne sufiĉe homajn interhomajn rilatojn de esperantistoj; la mondon nepretan akcepti Esperanton, kiun uzas nur manpleneto da homoj sur la planedo; fiaskon de ideotendencoj — de raŭmismo kaj finvenkismo. Tia estas la bildo de la ruiniĝanta Esperantio.

Esperantio mem situas kiel marĝena kaj ekskludita kompare kun la ĉefaj sferoj de socia vivo. Atestas tion karakterizoj de la loko de Esperanto. La aŭtoroj vidas ĝin ĉefe kiel perdatan, aŭ perditan, se temas pri internaciaj komunikiloj (Arosev); lokon inter lingvoj kun malalta societa prestiĝo (Steele); lokon en unu el strangaj grupoj el socia panoptiko (Vergara); lokon en kulturfliegema oazo libera de ruiniĝantaj rilatoj kaj agoj de kredantaj finan venkon (Silfer). Rigardante tiun bildon ni povas supozi, ke ĝi devas elvoki demandojn pri demarĝenigo kaj inkludo de Esperanto kaj esperantistoj. Kvankam al praktika socia vivo



apartenas fenomeno de homoj kaj sociogrupoj, kiuj adaptiĝis al sia marĝena socia pozicio.

Roloj: inter ĥimera etoso kaj kulturlingvo

Se ni prezentus kontinuan pri roloj de Esperanto (de primaraj al sekundaraj), karakterizitaj far la aŭtoroj, tiam roloj koncentriĝus je fino signita per roloj sekundaraj. Temas pri reduktiĝo de la lingvo al lingvistika interesiĝo kaj absolute ĥimera Esperanta etoso (Arosev), aŭ pri senperspektiva hobbio, kvankam Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ internacia pensmaniero (Steele), aŭ pri rolo de malamiko de la angla (Vergara). Ĉe alia fino de la kontinuo konserviĝas komunika rolo de “transnacia kulturlingvo” kiel baza rolo de Esperanto (Silfer).

Kion fari?

Laŭ Arosev, esperantistoj, por ne postresti, devos sekvi aktualajn tendencojn kaj “montri ekzemplon” de moderneco, ĉefe lige kun la ret-uzado, ekzemple, “enretigi” servojn, aktivi en sociaj retoj, enkonduki retan voĉdonadon ktp.

Baze de la raŭmista vidpunkto de Silfer, raŭmismo mem estas la recepto por agi en la Malnova Esperantio, kio signifas i.a. kreadon de la Nova Maledkstro en Esperantio, la Novan Esperantion — Civiton kiel konsorcion kun paktintoj, federismon, ĉar eblas alternativa maniero organizi Esperantion.

Steele opinias, ke, kvankam ne multo dependas de esperantistoj, ili povas kalkuli, ke potenĉavaj neesperantistoj fine komprenos la valoron de la

Vd. p. 4

Zamenhofa donaco al la mondo. Des pli, ke la ideo de Esperanto, laŭ Piron, estas tiom bona, ke iam ĝi devos venki. Esperantistoj tamen devas atendi aktive, agante: (1) Ili daŭrigu la propagandon, malgraŭ la limigitaj rimedoj, ke Esperanto restu parto de la monda kultura pejzaĝo. Necesas vivteni la lingvon kaj la idealon; necesas evoluigi la lingvon, ke ĝi estu preta por servi en ia ajn situacio, ia ajn fako. (2) Ili prilaboru terminarojn por ĉiu vivkampoj: scienco, filozofio, komerco, religio, politiko, ktp, ke oni povu tuj uzi ĝin. (3) Kaj ili neniam forgesu la idean flankon: Esperanto estas pli ol lingvo.

Laŭ Vergara, nek finvenkismo, nek raŭmismo, sed “plivastismo” — la reale ekzistanta sinteno kiun li rekonas ĉe multaj esperantistoj (kiel li mem). Temas pri homoj kiuj amas Esperanton, travivas ĝin kiel gravan eron de sia vivo, opinias ĝin valorega praktika ilo de tut-homara, tergloba konscio sur/per la plej homa trajto (la lingvo), kaj eventuale provas diversmaniere kontribui al ĝiaj prestiĝoj, videbligo kaj pluvivigo. Gravas plivastigi “plivastismon”.

Malgraŭ la bildo de la ruiniĝanta Esperantio la aŭtoroj ne konkludas malvenkon. Male, ili proponas manierojn pluvivi en ĝi.

Danĝera vivo en Esperantio

La vivo tie proponata far aŭtoroj sin prezentas danĝera. Iliaj trankviligaj respondoj ne estas tro konvinkaj. Kvankam la impreso pri la ruiniĝo malfortiĝas, se konsideri ne nur la disfalon, krizon, malaperon de multaj tradiciaj formoj de la Esperanto-vivo, sed ankaŭ aperon de formoj novaj, evoluon de nuntempaj.

Danĝeron elvokas jam iluzia rekono de kaŭzoj de detruo, malgraŭ la plej ofte veraj priskriboj de ĝia manifestiĝo. Tio vidiĝas kaze de “manko de bezonoj”, per kiu Arosev klarigas kaj la plimalvalorigon de Esperanto kiel internacia komunikilo, kaj la malaktivecon de esperantistoj. La merkata procezo, pri kiu li mencias karakterizante vendomarkon, okazanta ankaŭ en Ruslando, estas la esenca kaŭzo de “manko de bezonoj” pri Esperanto, sekve ankaŭ de sintenoj de esperantistoj, el kiuj “neniu bezonas ion ajn” (ekzemple, centran retan informojon, aŭ novan retejon de REU). La merkatan valoron de Esperanto oni ne povas serioze kompari kun la valoro de la angla. Samtempe la merkatiĝado de socio havas sian esprimon en Esperantio. En socio, en kiu ĉio iĝas varo, ĉio

estas por vendi, vole nevole gravas ne nur senti/havi bezonon, sed ankaŭ havi ilojn (monon) por realigi ĝin (en ekonomio tio nomiĝas efektiva bezono). Do “manko de bezonoj”, i. a. de esperantistoj devas esti analizata laŭ tio, kiomgrade temas pri manko de efektiva bezono (ekzemple, nepartopreno en Esperanto-kongresoj pro manko de mono).

Danĝera estas (mi dirus: en si mem kaj por si mem) la Nova Esperantio laŭ vizio de Silfer. Ne nur pro la raŭma narcisismo (kiun alivorte rimarkas Vergara) kaj eĉ ne pro uzado de distingo, kiu favoras dividi esperantistojn. Temas pri baza dependo de ekzisto de la raŭma Civito de la Malnova Esperantio (de kie devenas membroj de Civito, nun proklamita kiel la Nova Esperantio). La “malnova Esperanto-mondo” ruiniĝas, kaj laŭ tiu vizio falo de la Malnova Esperantio elvokos inundon, kiu subakvigas Civiton. La aŭtoro ŝajne ne konscias pri tiu konsekvenco. Li bonintence invitas tiujn, kiuj fine “subite ekvidis”, al *Titanic* — al Civito, kiu kiel formo de ŝtato (kvazaŭ Neŭtrala Moresneto) estas kontraŭdiro de la Zamenhofa vizio de Esperanto. Bela vojo iĝas “blinda” — fina vojo.

Male al la raŭma Esperantio, la Esperantio de Steele allogas pro la kruele vera pri la mondscale marĝena esperantistaro, kiu mem neniam kaŭzos “triumfon de Esperanto”, kaj tasko aktive agi malgraŭ tio. Ĉar la triumfo eblas, sed dependas de potenĉavaj neesperantistoj. Oni rimarkas, ke la danĝero dormas en praktika realigado de tiu sinteno. Kiam senpacieneco dominas, ĉar la atendado ŝajnas tro longa, inter esperantistoj formiĝas emo pli kaj pli forte influi potenĉavulojn eĉ koste de rezigno je la interna agado, ekzemple, de tiu postulata de Steele. Montris tiun ekstreman aliron la tiel nomata “pola konflikto”. Kiel mi sugestis (*La Ondo de Esperanto*, 2010, №12), la konflikto de atendoj je la triumfo de Esperanto estas produkto de la Esperanto-movado kaj rilatas al la du ĉefaj tendencoj. La unua baziĝas sur senĉesa popularigado kaj instruado de Esperanto (influoj de Zamenhof, Lanti k. a.). La dua rilatas al la konvinko, ke Esperanto iĝos akceptata mondscale, aŭ pli malgrandscale per decido politika de gravaj ŝtataj institucioj, internaciaj organizaĵoj (influoj de Hodler, Privat k. a.). Ĉe la unua kazo plej gravas desuba aktivado de esperantistoj, kiuj mem kreas bezonon instigante aliajn. Ĉe la dua sufiĉas desupra aktivado de Esperanto-elito kaj politika

decido enkonduki Esperanton, kiu kreas oferton. Utile estas nomi tiujn ĉi du tendencojn: desubisma kaj desuprisma. Kaze de la desuprisma sinteno povas aperi sakstrato: potenĉavaj neesperantistoj iĝas tro malfortaj por la decido kaj esperantistoj-desupristoj pro rezigno agi interne konfliktiĝas kun la agantaj tiuforme kaj aldone plimalfortigas la sufiĉe malfortan esperantistaron.

Esperantio de Vergara baziĝas je psika sinteno nomata plivastismo. Ĝi elkreskis el kritiko kaj forĵeto de raŭmismo kaj finvenkismo. El tiu ĉi fakto devenas kaj forteco kaj danĝera malforteco de plivastismo. La du kontraŭdiraj tendencoj, kiel ĝuste substrekas Vergara, plenumis sian rolon. Li opinias, ke temas pri “false dupolusa Esperanto-ideologia kampo”. Estas interese, ke la aŭtoro de la kvara vizio memstare sekvas la vojon montritan en la Proklamo de Voss (1991) kaj Proklamo pri elĉerpiĝo de la paradigmo finvenkismo-raŭmismo (Poznań, 2003). Ambaŭ dokumentoj substrekas, ke ekzistas pluraj movadaj tendencoj, kaj nek raŭmismo nek finvenkismo estas la plej fundamentaj. El studoj pri la movado devenas kelkaj klasifikoj. La bazaj ideotendencoj devenas, laŭ mi, de diferenco, substrekita de Jerzy Leyk, inter pure komunika aliro al la rolo kaj funkcio de Esperanto, kiu meritas vastan eklernon kaj rekonon pro la komunikaj valoroj (ekzemple, la grupo de Beaufront), kaj kulturporta kaj socipretenda aliro al la rolo kaj funkcio de Esperanto, kiu proksimigas popolojn kaj esence ŝanĝos sociajn rilatojn (Zamenhof-Hodler-Privat). Alivorte, temas pri elitisma kaj popola tendencoj. Plivastismo estas danĝera, ĉar ĝi malfortas pro la sterila karaktero de “siaj gepatroj”: finvenkismo-raŭmismo, de kies kritiko ĝi aperas, kaj pro sia psika karaktero, grava, sed ne bone servanta al objektiva analizo. Praktike, ĉeestanta en la movado de ĝia naskiĝo.

La komparo paradokse atestas, ke la bildo de la ruiniĝanta Esperantio, kvankam ne ĉiupunkte vera, elvokas principe emon batali eĉ kaze de la marĝena rolo de la lingvo kaj la movado.

Malkovriĝis ankaŭ pensmanieroj, kiuj ne servas al la vera bildo pri ili. Al tiuj ĉi pensmanieroj apartenas la neado de la socie marĝena kaj ekskludita pozicio de Esperanto kaj esperantismo. La prezentitaj vizioj priskribas, kiel, konsciante pri limigoj kaj danĝeroj, oni povas vivi kiel esperantisto en la nuntempaj cirkonstancoj.

Nova statuso de UEA ĉe Unesko

UEA fariĝis konsulta partnero de Unesko. Tiel decidis la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Irina Bokova, konforme al la novaj gvidlinioj pri la rilatoj de Unesko kun Ne-Registaraj Organizaĵoj (NRO-j), kiujn la Ĝenerala Konferenco adoptis en novembro. Laŭ la novaj gvidlinioj ne plu temas pri rilatoj sed pri partnereco por pli bone esprimi, ke Unesko celas kunlabori kun NRO-j por la komunaj celoj kaj ne nur formale rilati kun ili. Por Unesko NRO-j estas gravaj, ĉar pere de ili ĝi rekte atingas la civilan socion preter la ŝtataj strukturoj.

UEA havas oficialajn rilatojn kun Unesko ekde 1954. Antaŭe estis tri kategorioj: apud la plej alta el ili, formalaj asociaj rilatoj, ekzistis formalaj konsultaj rilatoj kaj operaciaj rilatoj. UEA troviĝis en tiu lasta kategorio. Ekde nun estas du kategorioj: asocia kaj konsulta partnerecoj. En la unua estas akceptataj nur malmultaj grandaj NRO-j por la periodo de ok jaroj. La konsulta partnereco ne estas tempe limigita, sed la koncernaj NRO-j devas montri konstantan aktivecon kaj daŭre kontribui al la agadoj de Unesko je ties plena kontento. Por ke la partnereco estu sur firma kaj serioza bazo, Unesko asignas ĝin nur al NRO-j, kiuj havas establitan centran oficejon kaj plenumas ankaŭ aliajn postulojn.

La plej longedaŭra kontribuo de UEA al Unesko estas la eldonserio *Oriento-Okcidento*, en kiu ekde 1961 aperis 49 mondliteraturaj verkoj en Esperanta traduko. UEA esperantigis kaj eldonis ankaŭ librojn kaj aliajn materialojn de Unesko. La temo de la Universala Kongreso estas ofte ligita al speciala jaro aŭ jardeko de Unesko, kaj la temo estas pritraktata en kongresaj programeroj. Multaj UK-oj ricevis mesaĝon de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, laste la 96a UK en Kopenhago. UEA partoprenis en diversaj kampanjoj de Unesko; ekzemple, en la kolektado de subskriboj por la Manifesto 2000 por Kulturo de Paco kaj Senperforto ĝi estis inter la plej aktivaj NRO-j.

Pro sia oficiala statuso UEA havas pli facilan aliron al la Ĝenerala Konferenco kaj aliaj aranĝoj de Unesko. La plej elstaraj kaj daŭre valoraj atingoj de UEA ĉe Unesko sendube estas la rezolucioj de la Ĝeneralaj Konferencoj en Montevideo (1954) kaj en Sofio (1985) kiel la internacie plej gravaj rekonaj al Esperanto kaj Universala Esperanto-Asocio.

GK UEA



Kroatio: Esperanto en karnavalo

Ĉi-jare, jam la sesan fojon sinsekve la Esperanto-Maskerada Kompanio *Pažđoć* el Rijeka (Kroatio) partoprenis la Internacian Karnavalan Paradon en Rijeka, kiu estas unu el la plej konataj en Kroatio kaj Eŭropo. La 19an de februaro en la karnavala parado partoprenis cent da grupoj kun ĉirkaŭ ok mil partoprenantoj. La parado de maskitoj daŭris pli ol sep horojn. Ĝin spektis ĉirkaŭ cent mil spektantoj.

La Esperanto-kompanio ĉi-jare elektis la nomon *Bombonjera*. Ĝi nombris 30 maskitojn kaj havis alegorian ĉaron, sur kiu oni faris imiton de granda kaĝo kun kaptitaj personoj ene. La nomo de la grupo “Esperanto Kompanio *Pažđroć*” estis klare videbla sur la malantaŭa flanko de la veturilo, kaj la grupo per Esperanta anonco estis menciata je kontrol-punktoj por publiko.

Al la Rijeka karnavalo estas akceptataj grupoj el aliaj urboj kaj landoj. Ĉiuj interesuloj kiuj volus partopreni la paradon sekvontjare kiel anoj de nia karnavala grupo, aŭ kiel aparta karnavala grupo, aŭ kiel spektantoj, kontaktu la Esperanto-Societon Rijeka: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr

Vjekoslav Morankić



Semajno de Internacia Amikeco

Leuven estas malnova kaj plenviva urbo en la centro de Belgio kun ĉirkaŭ 90 mil enloĝantoj plus 35 mil universitataj studentoj. Jam de jaroj la tiea asocio *Esperanto 3000* festas la Semajnon de Internacia Amikeco, ekde 1994 ĉiun duan jaron.

La temo de ĉi-jara festo estis Esperanto kaj Interreto. Prelegis Yves Nevelsteen pri Komputeko, Marek Blahuš pri la kulturo de libera scio kaj disdonado en la reto, Marc Vanden Bempt pri la strategio de loka Esperanto-grupo en Flandrio. Paralele okazis distra programo kun promeno tra la miljara urbo kun legendoj kaj sciindaĵoj el fora pasinteco rakontitaj de Ivo Schenkel, diversaj vortludoj kaj kvizo en kiu Ilse Jacques kontrolis kiom la partoprenantoj ankoraŭ scias pri la iamaj monoj kaj pri la nun dekjara eŭro. Laŭ tradicio la feston kronis abunda bufedo sub reĝisorado de Helena Van der Steen kaj la glatan iradon de la tago garantiis dudekpersona skipo.

Same laŭ tradicio la ĉeestantoj povis aĉeti gratulkartojn okaze de la Semajno de Internacia Amikeco. Ili mem subskribis tiujn kaj petis aliajn ĉeestantojn ankaŭ subskribi, antaŭ ol tiuj kartoj ekflugis en ĉiujn direktojn en la mondon.

En 2000 la urbo plantis jarmilan Esperanto-arbon en la centro. Antaŭ du jaroj subite tiu arbo malaperis, poste ĝi estis retrovita ducent metrojn de tie. La partoprenantoj en la urba promenado nun povis admiri la novan memortabulon unu tagon post ties lokigo: “Ĉi tiu arbo estis plantata en la jaro 2000 en kurbo de la rivero. Dek jarojn poste oni konstruis la Dilo-terason, kaj la arbo devis esti translokata. Per sia propra vivipovo, kaj danke al la diligentaj zorgoj de subtenantoj, la Esperanto-arbo nun povos plu kreski”.

La urbestro de Loveno deklaris la semajnon oficiale “Semajno de Internacia Amikeco en la urbo Leuven”. Li skribis:

“La Urbo Loveno plene konscias pri la lingva diverseco kaj pri la graveco kaj bezono de kompreno trans landlimoj. Tiu ĉi bezono forte sentiĝas hodiaŭ en la institucioj de la Eŭropa Komunumo, sed ankaŭ ekster ĝi, je monda nivelo. Internacia amikeco trans la lingvaj kaj naciaj limoj estas necesa kondiĉo por ke homoj en la tuta mondo komprenu unu la aliajn kaj kunvivu pace. La Urbo Loveno volonte malfermas siajn limojn por saluti siajn vizitantojn el aliaj landoj”.

Marc Vanden Bempt

E@I kaj lernu.net en Ĉinio

Kvarpersona teamo — Peter Baláž kaj Indrė Pileckytė el E@I, kaj Jevgenij Gaus kaj Neringa Gaus el lernu.net — vojaĝis preskaŭ dum la tuta februaro tra Ĉinio.

Ĉinio estas nuntempe tre alloga lando por investantoj — ĝi iĝas pli riĉa kaj malfermita, kio ebligas multajn evoluojn, kiuj ne estis imageblaj antaŭ kelkaj jaroj. Kiel unu el la nunaj superpotencoj kun grandega merkato (1,3 miliardoj da homoj), ĝi meritas ankaŭ novan strategion por plividebligi tie Esperanton.

Dum la lastaj monatoj efektive rapide kreskas vizitoj kaj registriĝoj en la reta Esperanto-lernejo — lernu.net de Ĉinio. (Kio rekte rilatas kun pli ofta kaj pli amasa uzado de la interreto en la lando.) Nuntempe ĉinaj uzantoj iĝas unu el plej grandaj grupoj, laŭ la kresko de registriĝoj. Pro tio E@I-teamo decidis viziti Ĉinion kaj esplori la landon kun granda potencialo — ankaŭ por Esperanto.

Dum la esplorvojaĝo ni vizitis plurajn urbojn: Pekino, Ŝanhajo, Nankino, Honkongo, Haikou (insulo Hajnana). Ĉie ni estis tre amike gastigitaj de lokaj Esperantistoj kaj povis multe diskuti kun ili.

En Pekino okazis kelkaj intervjuoj por la Esperanta redakcio de la Ĉina Radio Internacia, ni ankaŭ vizitis la sidejon de la servo *El Popola Ĉinio* kaj de Ĉina Esperanto-Ligo.

En Hajnana la teamo vizitis la iniciaton de Dennis Keefe “Esperanto-insulo”, prelegis pri lernu.net kaj pri la agado de E@I, diskutis kun la organizantoj kaj instruistoj tie.

En Ŝanhajo kaj Nankino ni parolis pri ebla estonta kunlaboro kun gravaj personecoj de la tiea movado.

Ĉi-jare la retejo lernu.net estas rekonstruata. Unu el niaj celoj estis esplori pri la uzado de interreto en Ĉinio, pri la kutimoj, ebloj, sistemoj tie — ja Ĉinio havas multajn malsamecojn pri la retuzado, kompare kun, ekzemple, Eŭropo.

Bone kompreni la interreton en Ĉinio kaj ties uzadon signifas povi pli bone videbligi Esperanton en la reto. Ofte eĉ malgrandaj projektoj, agoj, eventoj povas kaŭzi grandajn ŝanĝojn. E@I volas nun pli forte videbligi Esperanton ankaŭ en ĉinaj retpaĝoj, aranĝi, ke Lernu.net estu facile trovebla paĝaro por la ĉina publiko. Potencialo de Ĉinio estas ankaŭ por Esperanto tre bona okazo por kreski kaj fortiĝi.

Sed ne nur pri reta agado temis dum la vojaĝo. E@I planas estonte okazig(ad)i en Ĉinio Someran Esperanto-Studadon (SES). Pro la sukceso de SES en Eŭropo (ĝi okazis jam kvarfoje, dum la lastaj jaroj kun 190 partoprenantoj el pli ol 25 landoj), la teamo esploris eblajn taŭgajn lokojn por simila aranĝo ankaŭ en Ĉinio. Nia celo estas iam estonte povi organizi tian aranĝon en diversaj kontinentoj, por ebligi al homoj



Apud la Budho-statuo en Honkongo

de pli proksime veni kaj lerni “surloke”. Do post SES Eŭropa eble baldaŭ naskiĝos SES Azia.

La vojaĝo multe helpis al E@I kaj lernu.net — ni ekkonis plurajn movadanojn en la lando, starigis utilajn kunlaborajn kontaktojn. Ni multe lernis pri la lando mem, ĝiaj socio kaj kulturo. La uzado de interreto tie ankaŭ estas jam pli klara kaj laboroj por pli bona videbligo de lernu.net kaj Esperanto ĝenerale iĝis pli konkretaj.

Grandan dankon ni volas esprimi al ĉiuj Esperantistoj, kiuj helpis al ni dum la vojaĝo — ili gastigis nin, gvidis tra urboj, diskutis. La vojaĝo estis sukcesa paŝo al plifortigo de la rilatoj, starigo de novaj kontaktoj kaj evoluigo de la Azia kunlaboro pri aktivado de E@I kaj Esperanto ĝenerale.

Aparte ni dankas ankaŭ al ESF (Esperantic Studies Foundation), kiu grandparte financis la vojaĝon. La vizito okazis kadre de la nova “projekto”, rekonstruo de lernu.net, sed ankaŭ konstruo de kelkaj novaj projektoj. ESF estas daŭre la plej granda subtenanto de E@I kaj ties projektoj (ja sen ESF lernu.net tute ne ekzistis). Se ankaŭ vi volas subteni plibonigon kaj pliefikigon de la projekto *Lernu!* kiel ilo por disvastigi Esperanton tra la mondo, kontribuu al la kampanjo “100.000 eŭroj por ESF”, kiun E@I lanĉis omaĝe al 100.000 registritaj uzantoj, kaj nuntempe lernu.net jam havas 113.350 aliĝintojn, kaj registriĝoj daŭre kreskas.

Detalojn pri la kampanjo vidu ĉe: <http://kampanjo.ikso.net>

Peter Baláž
E@I-kunordiganto



La simbolo de Bjalistoko

La 13an de februaro la Pollanda retejo onet.pl proponis elekti la simbolon de Bjalistoko el naŭ kandidatoj, inter kiuj estis ankaŭ Ludoviko Zamenhof.

Du tagojn poste Zamenhof estis en la kvara loko kun 9% da voĉoj, kaj Ela Karczewska el la Bjalistoka Esperanto-Societo informis pri la projekto de onet.pl en la Yahoo-grupo polaj-esperantistoj. Ŝia alvoko, ripetita en pluraj grupoj ĉe Yahoo kaj en sociaj retoj, dum unu tago ŝanĝis la situacion, kaj la palaco de la familio Branicki, kiu estis en la unua loko, rapide cedis sian pozicion al Zamenhof, danke al voĉoj donitaj de esperantistoj el multaj landoj, ankaŭ el Brazilo kaj Ruslando.

Kvankam la voĉdonado ne estis fermita, jam la 21an de februaro la regiona redakcio de onet.pl konstatis, ke, je ĝia miro, estas elektita ne la palaco de Branicki, kiu estis plej multe proponita kiel la kandidato por la listo, sed Ludoviko Zamenhof (la redakcianoj konfesis, ke ili mem voĉdonis por la palaco).

Ŝajnas, ke la voĉdonado ne havas tempolimon, kaj oni vidas, ke je la 15a de marto estas donitaj sume 4798 voĉoj. La aŭtoro de Esperanto ricevis 2063 voĉojn (43%) — preskaŭ duonon de la tuto. Por la palaco de Branicki, ofte nomata la Pola Versajlo aŭ Podlaĥia Versajlo, estas donitaj 1317 voĉoj (27%). La piedpilka teamo *Jagiellonia Białystok* kun 529 voĉoj (11%) restis en la tria loko. La ceteraj kandidatoj estis malmulte subtenitaj.

Ĉi tiu elekto estas neoficiala kaj ne-deviga, ĉar ĝin aranĝis retejo ne ligita kun la urbaj aŭtoritatoj, tamen la rezulto estas tre agrabla por la esperantistoj, kiuj ĉi-jare festos la 125-jariĝon de sia lingvo. Kaj eble ĉi tiu tute klara opini-esprimo estos konsiderita ankaŭ ĉe la definitiva elekto de la nomo de la patro de la Bjalistoka universitato, pri kiu oni baldaŭ devos akcepti decidon.

Aleksander Korĵenkov

Infanoj dancas ĉirkaŭ la Zamenhofa monumento en Bjalistoko.



En la lando de mimozoj

91 partoprenantojn el dek landoj allogis la 6a Mediteranea Esperanta Semajno (MES 2012), okazinta ekde la 25a de februaro ĝis la 3a de marto en la lando de mimozo-arboj apud Saint-Raphaël (Francio).

La kurso estis trnivela: la unuagrada kurso por ne veraj komencantoj kun Perla Mielo el Hungario, la duagrada kurso por parolantoj kun Zsófia Kóródy el Germanio, la triagrada kurso por spertuloj — diskuto/analizo kun Peter Zilvar el Germanio.

Sed dum la kursoj la instruistoj estis anstataŭataj de aliaj instruistoj, kaj la kursoj tre bone disvolviĝis kaj ĉiuj estis kontentigitaj. Perla sukcesis paroligi kaj kantigi siajn gelnantojn. Zsófia havis tro da parolemuloj tagon post tago, kaj prezentis la libron pri la KER-ekzameno klarigante kiel uzi ĝin por trapasi tiun ekzamenon!

Peter Zilvar donis al siaj kursanoj informojn pri la diversaj Esperantaj institucioj tra la mondo kaj pri la movado, pri gazetoj, semajnaj aranĝoj, ekzamenoj, ĉio ĉi en konstantaj interŝanĝoj kun la gelpartoprenantoj.

Daniel Moirand el Francio anstataŭis lin kaj klarigis la devenon de la *1001 noktoj*, rakontis historiojn kaj, kompreneble, donis ĝeneralajn informojn pri la *1001 Noktoj*. Li bazis sian kurson sur gramatikaj elementoj.

Ankaŭ Pascal Vilain klarigis kelkajn tiklajn punktojn pri gramatiko en angulo de la klasĉambro kaj lia edzino Mariroza paroligis la negramatikŝatantojn en alia angulo.

La vesperoj estis interesaj: informoj pri la ĉiutaga vivo en Finnlando, lumbildoj pri travivaĵoj en Esperantujo, pri la Esperanto-urbo Herzberg, pri Sumatro kaj la adiaŭa vespero kun muziko, kantoj, humuraĵoj, ktp... Neforgesebla ŝipromenado al Saint-Tropez, kie loĝas ĉe la marbordo Brigitte Bardot, najbarino de kelkaj miliarduloj.

La konstanta mirinda bluĉiela vetero permesis multajn promenadojn laŭlonge de la marbordo posttagmeze antaŭ la vespera kurso. Mirinda etoso dank' al ĉiuj partoprenantoj kaj precipe dank' al la organizantoj (Kristin kaj Monik), kiuj elektis paradizan fericentron. Ni ĉiuj dankas kaj invitas vin por la venontjara printempo.

Josée Lafosse

Sur la dekstra foto: Perla kantas

Pontlingvo por la Suda Azio

La unua Sud-Azia Seminario de Esperanto (SAS) okazis ekde la 1a ĝis la 6a de marto en Katmanduo, la ĉefurbo de Nepalo, kun 65 partoprenantoj el Nepalo, Barato kaj Pakistano, kaj gastoj el Usono kaj Japanio.

La programo komenciĝis per la himno *La Espero*. Poste la prezidantino de Nepala Esperanto-Asocio Indu Thapaliĵa bonvenigis ĉiujn kaj diris, ke Esperanto sendube taŭgas kiel pontlingvo en la landoj de Suda Azio. La angla estas lingvo de neniu Sud-Azia lando, do ne havas sencon uzi ĝin kiel la pontlingvon. Estis legitaj bondeziraj mesaĝoj el la tuta mondo, kaj landaj reprezentantoj salutis nome de siaj landoj kaj raportis pri landaj agadoj.

La 2an de marto komenciĝis laborprogramo, kadre de kiu okazis kvar kursoj de Hori Jasuo kaj 15 prelegoj pri diversaj temoj. La 4an de marto oni ekskursis al la monteto Shivapuri rande de la valo Katmanduo. En la fermo oni konstatis, ke dum la trilandna kunveno oni uzis nur Esperanton. Tio pruvas ke Esperanto jam servas kiel pontlingvo en nia regiono, kaj Esperanto estu la pontlingvo inter ĉiuj sudazianoj.

Oni decidis okazigi SAS en ĉiu dua jaro kaj fiksi la daton kaj lokon unu jaron antaŭe. Estis formita provizora komitato, kies anoj devos ricevi aprobon de siaj propraj organizoj — sekretario: Bharat Ghimire (Nepalo); asistaj sekretarioj: Kotha Naga Siva Kumar (Barato), Adeel Butt (Pakistano); konsilantoj: SS Pal (Barato), Hori Jasuo (Japanio).

La unuaj ĉefaj celoj de la komitato estas: (1) kontaktiĝi kun Bangladeŝaj kaj Srilankaj esperantistoj kaj inviti ilin al kunlaboro; (2) elekti reprezentantojn en la komitaton; (3) instrui Esperanton en ĉiuj ĉefurboj de la Sud-Aziaj landoj; (4) fari publikaĵojn pri Esperantaj kaj regionaj aferoj; (5) kunlabori gefrate por la regiona movado.

Bharat Ghimire





Esperantistoj kunvenis en Toledo kvazaŭ prologe al la 71a Hispana Kongreso de Esperanto.

Prologe al la Hispana Kongreso

Dum la dua februara semajnfino, por akompani la lernantojn de la kurso de Esperanto ĵus finiĝinta tie, dudeko da esperantistoj kunvenis en la historia urbo Toledo. Ili venis el aliaj provincoj de la regiono Kastilio-Manĉo, el Madrida regiono kaj el Ekstremaduro. Ankaŭ estis rimarkinda la ĉeesto de pluraj eksterhispanianoj, ĉu nuntempe loĝantaj en Hispanio, ĉu vizitantaj la landon, el Usono, Kubo, Maroko kaj Francio.

Oni profitis por fari kunvenon de la Esperantista Asocio de Kastilio-Manĉo, regiono en la suda parto de la Hispania granda ebenaĵo, la tero de Donkiĥoto, regiono ĝenerale ne tre favora al nia lingvo ĝis nun, sed kiu dum la lastaj jaroj spertis atentindan kreskon de la movado kaj de la intereso al la lingvo.

Ĝi estis adekvata prologo al la 71a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la koro de la tero de Donkiĥoto, en Almagro — urbo negranda, sed tre interesa el turisma vidpunkto, kun bone konservitaj antikvaj monumentoj, inter kiu elstaras la plej antikva teatro en la lando laŭ la modelo de la t. n. “teatrokorto”. La loko estis restaŭrita kaj plu uzata, tiel ke Almagro fariĝis la ĉefurbo de la teatro en la lando, kun jara Internacia Festivalo kaj tiutema muzeo.

La kongreso okazos inter la 27a de aprilo kaj la 2a de majo. Ĝi programos diversajn kulturajn eventojn, inter kiuj omaĝo al la teatro, kaj oni ankaŭ festos la 20-jaran firmigon de la Ibera Skolo de literaturo, kun ĉeesto de pluraj el la verkistoj, membroj de tiu grupo.

José Antonio del Barrio

Lingvo kun monda ambicio

Marek Blahuš, ĉeĥa esperantisto kaj staĝanto ĉe la Eŭropa Komisiono, prezentis Esperanton al 110 oficistoj de EU, precipe tradukistoj. La du prelegoj, kiuj okazis la 27an de februaro en Bruselo kaj la 1an de marto en Luksemburgio, estis parto de Tradukforumo de EU. Sub la titolo “Lingvoj kun mondaj ambicioj” Esperanto prezentiĝis kune kun la ĉina.

La prelego ricevis tre pozitivajn reagojn, kaj estas notinde, ke EU mem invitis la preleganton. Multaj partoprenantoj montris surprizon pri malkovro de Esperanto kiel viva kaj eleganta lingvo kaj entuziasme starigis demandojn, inter kiuj forestis la kutimaj antaŭjuĝoj. Ĝuste tiu pozitiva impresado estas la plej valora rezulto de la prelego. Akompanata de lumbildoj, ĝi finiĝis per komuna kantado de la Eŭropa himno en Esperanto.

Marek Blahuš

Moskvo: Seminario prokrastita

La por-instruista seminario, pli frue anoncita de REU (*LOdE*, 2012, №3), ne okazos en la menciitaj datoj (fine de marto). La ĉefa kialo estas ke la universitato *Justo*, pli frue posedata de esperantistoj, nun estas oficiale gvidata de aliaj homoj. Ĝuste en la ejo de *Justo* devus okazi la seminario kaj partoprenantoj devus post ekzameniĝo ricevi diplomojn de la universitato. Bedaŭrinde la novaj gvidantoj ne bezonas Esperanton kaj ĉion, ligitan kun ĝi.

La seminario ne estas nuligita, sed prokrastita, ĝis REU trovos novan lokon.

Grigorij Arosev

Verda Majo — centjara

Antaŭ cent jaroj, la 7an de marto 1912 naskiĝis la japana esperantistino Hasegawa Teru, kiu famiĝis en Esperantujo kiel Verda Majo. La 7an de marto 2012 ĉinaj esperantistoj okazigis memor-kunsidon pri ŝi en la urbo Wuhan (provinco Hubei).

En Wuhan Verda Majo vivis kaj batalis. Laŭ memskribo de Verda Majo, la periodo julio–oktobro 1938 en Wuhan estis la tempo de la plej intensa laborado kaj la plej ekzalta animstato dum ŝia vivo. Tiam ardis la kampanjo “Defendo de la Granda Wuhan” en la ĉina rezistmilito kontraŭ la japana invado. Per sia japana disaŭdigo Verda Majo partoprenis en la justa milito de la ĉina popolo kaj akiris eternan estimon en Ĉinio.

La kunsidon iniciatis Ensemblo de Esperantista Salono (EES), kies membroj plejparte membras ankaŭ en Hubei-a Esperanto-Asocio (HEA). En la kunsido estis eksponataj libroj verkita de kaj pri Verda Majo. La kunsidon malfermis s-ino Aroma, la ĉefsekretario de HEA. Membroj de EES deklamis rondelojn, kiujn Hu Guozhu verkis en 2002 kaj 2012 omaĝe al la 90a kaj 100a naskiĝdatrevenoj de Verda Majo.

Hu Guozhu prezentis prelegon pri la centjara Verda Majo, ilustritan de 26 lumbildoj. Lia artikolo *Karmemore al Verda Majo*, verkita en 2002, unue aperis en la repaĝo Ĉinio, kaj poste estis multfoje citita de aliaj aŭtoroj kaj estis presita en la libro *Hu Laŭdas Verdakore*.

Li Yuping (Esperanta parolistino de Ĉina Radio Internacia kaj eksa vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo) kaj Zhang Tianxin (prezidanto de HEA dum 1986–1989) skribe kontribuis al la programo. Zhang Tianxin estis amiko de Verda Majo kaj la titolo de lia rememoro estas *Mi gardas la pordon de la hejmo de Verda Majo*.

La ĉeestantoj kun respekto kaj karmemoro parolis pri Verda Majo. Oni bruligis kandelojn sur la Esperanta kuko, speciale farita por la jubileo (*vidu ĉi-sube*).

Eĉino



Konferenco en Latvio

La 3an de marto 2012 en la domo de Latva Societo de Rigo okazis la 13a Konferenco de Latvia Esperanto-Asocio (LatEA) dediĉita al la 125a datreveno de Esperanto. Kadre de la konferenco okazis ĝenerala kunveno de LatEA, prelego de Aldis Bušs “Esperanto — 125” kaj prelegoj de Margarita Želve “Aleksandrs Strautmanis — 100” kaj “2012 — jaro de Tibor Sekelj”. Por la partoprenantoj kantis Agita Kaužena, oni honorigis la vicprezidantinon de LatEA Biruta Rozenfelde okaze de la 55a datreveno de ŝia esperantisteco, diskutis pri agado en jubilea jaro de Esperanto, rakontis rememorojn pri esperantisto Aleksandrs Strautmanis, parolis pri partopreno en someraj aranĝoj k. a.

Margarita Želve
prezidantino de LatEA

Malferma Tago en CO: Du jubileo

La 36a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 28an de aprilo atentis la 50an datrevenon de la transloĝiĝo de la sidejo de UEA al Nieuwe Binnenweg 176, sendube la plej fama adreso en Esperantujo.

Kiel estrarano de TEJO kaj UEA kaj pro siaj esploroj kiel historiisto, d-ro Ulrich Lins vizitis la Centran Oficejon multfoje dum preskaŭ la tuta 50-jara periodo en ties nuna domo. Dum la Malferma Tago li rememoros pri siaj vizitoj, pri famaj kaj malpli famaj personoj, kiujn li renkontis, kaj pri movadaj eventoj, en kiuj la CO ludis rolon. Pri la strato mem rakontos Osmo Buller, montrante specimenojn el sia kolekto de bildkartoj pri Nieuwe Binnenweg, unu el la plej historiaj stratoj de Roterdamo.

Kompreneble ne povos manki atento al la 125a datreveno de la apero de la Unua Libro de Esperanto. Stefan MacGill, prezidanto de ILEI, rakontos pri la naskiĝanta *Kurso 125*, reta Esperanto-kurso speciale kreota lige kun la datreveno. Pri la agado lige kun la jubileo informos kaj respondos demandojn ankaŭ la estraranoj de UEA. La tuta Estraro sub la gvido de prezidanto Probal Dasgupta ĉeestos en la Malferma Tago, post kiu la estraranoj restos en Roterdamo por tritaga kunsido.

Kiel ĉiam, en la programo estos ankaŭ libroprezentadoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio.

GK UEA

Vintraj Tagoj en Finnlando

Riihimäki estas urbeto naskita de fervojo, trafika nodo sesdek kilometrojn norde de Helsinko. La tradiciaj vintraj tagoj de EAF kolektis tie kvardekon da esperantistoj la 10an-11an de marto. Sed tiom nur fizike; rete partoprenis pliaj. Katalin Kováts donis retan prelegon pri instruista trejnado ĉe Edukado.net, kaj sub gvido de Anna Löwenstein ni vagadis en la reta mondo *Dua Vivo* kun kelkaj samideanoj. Estis nova sperto al plejmulto.

Nova estis ankaŭ filma metiejo: Keith Uber reĝisoris produktadon de ses filmetoj, videoklipoj, per plej simplaj iloj. Ĉiu fariĝis stelulo! Vidu en *youtube* per serĉo “esperanto eaf” kaj vi trovos.

La ĉefa novaĵo dum la tagoj tamen estis malnova, je 90 jaroj: Sylvia Hämäläinen prezentis la historion de nia ILEI-sekcio, kaj estis publikigita ŝia 109-paĝa libro *Ni semas kaj semas... Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj 1921-2011*. La esperantlingva verko, kun ampleksaj resumoj en la fina kaj sveda, estas mendebla ĉe EAF.

Estis prezentita ankaŭ la projekto *125 jaroj* kaj lanĉita speciala poŝtmarko kun ties emblemo. Ne de la landa poŝto, sed speciale mendita de la asocio. La malgranda eldono elvendiĝis, pli mendigis — filatelistoj vidu en la EAF-ĉeĉambro.

La dimanĉa jarkunveno de la asocio reelektis Tuomo Grundström prezidanto. Nove estis elektita en la estraron Tapani Aarne el Tampere. Ceteraj anoj estas Päivi Saarinen, Tiina Kosunen, Paula Niinikorpi, Tiina Oittinen, Jukka Nikoskelainen, Börje Eriksson, Keith Uber kaj Robert Bogenschneider.

La asocio kelkfoje nomumis Aganton de la Jaro. Nun estis distingitaj du Merituloj de multaj jaroj: Mikko Mäkitalo kiel redaktoro kaj Ilkka Santtila kiel enpaĝiganto de *Esperantolehti* “emeritiĝis” kaj lasis al siaj sekvantoj grandan defion teni la nivelon.

La tagoj estis finitaj ekskurse al la Finnlanda Muzeo pri Vitro, la ĉefa vidindaĵo en tiu (eks)industria urbo.

Tuomo Grundström



Unufraze

★ La 3an de marto, je la komenco de la lernojaroj en lernejoj de Brazilo, e-istoj okazigis Ago-Tagon por kiu estis presitaj 30 mil varbfolioj, senditaj al 50 lokaj E-grupoj en Brazilo. (Emilio Cid)

★ La E-muzeon de la Aŭstria Nacia Biblioteko en 2011 vizitis 9 mil 781 personoj — rekorda kvanto; en 2009 estis 5.886 vizitantoj, en 2010 estis 7.523. (*Libera Folio*)

★ 21 feb en la Jura Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM) okazis konferenco pri Eo kun partopreno de cent studentoj, el kiuj 32 studentoj venis post kvar tagoj al la unua leciono de E-kurso ĉe UNAM. (Luis Cordova)

★ En la dua semestro de la studjaro 2011-2012 Zaozhuang-a Universitato daŭre okazigas E-kurson de Sun Mingxiao (Semio), kiel nedevigan 36-horan studobjekton por du poentoj. (ĈIIC)

★ Ekspozicio pri Eo k ties kulturo estis aranĝita 26 feb en lernejo de la urbo Nankasahibo (Pakistano) kun ĉeesto de lokaj aŭtoritatoj, e-istoj, lokanoj k aliurbanoj. (Landa Agado)

★ Ekde januaro la libera radiostacio Radio FREI en Erfurt (Germanio) ĉiun unuan dimanĉon de monato je la 9a horo vespere emisias unuhoran E-programon. (*Esperanto aktuell*)

★ La asocio *Armor Espéranto* aranĝis E-kurson en la Mult-Kultura Junulara Centro en San-Briego, Francio. (*La Sago*)

★ Sébastien Denux (Francio), Paweł Fischer-Kotowski (Pollando), Ronald Baby González (Kubo/Hispanio), Magnus Henoch (Svedio/Britio), Zsófia Pataki (Hungario), Wang Shanshan (Ĉinio) k Przemysław Wierzbowski (Pollando) estas kandidatoj, inter kiuj la individuaj membroj de TEJO elektos kvar Komitatanojn B. (GK UEA)

★ La juna hispana e-isto Indalecio Séura, ekdeĵoris en ICH (Herzberg, Germanio); li plenumos ankaŭ taskojn por ILEI, paralele kun tiuj farataj de Teresa Liberska. (Stefan MacGill)

★ Per reta voĉdonado la Komitato de TEJO akceptis la Meksikan E-Junularon kiel sian 46an landan sekcion. (TEJO)

★ Je la 16a de marto al la 97a UK en Hanojo aliĝis 627 personoj el 52 landoj, plej multaj el: Vjetnamio 128, Japanio 117, Francio 60, Brazilo 31, Germanio 29, Italio 20, Nederlando 18, Pollando 17, Koreio 16, Britio 13, Ĉinio 12, Belgio 11. (uea.org)

Teorio de disvastiĝo de novaĵoj, aplikata al Esperanto

de Dennis Keefe

Dum jardekoj, oni povas diri ekde la jaro 1887, esperantistoj firme kredadis, ke ilia lingvo estas nova ilo, plene taŭga por la rolo de internacia helplingvo. Esperanto estas neŭtrala, relative facile lernebla, kaj iusence logika. Per tiuj tri trajtoj ĝi, laŭ esperantistoj, klare superis la francan lingvon de la 19a jarcento, kaj la anglan de la 21a. Tamen spite al ĉi tiuj klaraj avantaĝoj, malmulte da homoj antaŭe kaj nun akceptas Esperanton kiel internacian lingvon.

Multe da esperantistoj, kiel multe da aliaj homoj, kredas, ke se nova ideo aŭ nova produkto estas pli bona ol konkurencaj ideoj kaj varoj, ĝi nature estos post nemulta tempo akceptata aŭ aĉetata de homoj. Multo el la moderna fundamento de la fako ekonomiko baziĝis sur la principo de racieco. Racia homo akceptas ideon, se ĝi estas pli avantaĝa ol alia ideo aŭ varo kiu eble kostas pli, aŭ ne funkcias tiel rapide, aŭ ne daŭrovivas tiom da tempo, ktp. Sed estas longa listo de varoj kiuj estas okulfrappe pli bonaj ol alternativoj, sed kiuj tamen estas ne rapide akceptataj de la homaro. Esperanto apartenas al tiu listo.

Ni rigardu kelkajn ekzemplojn de pli bonaj ideoj, kiuj tamen ne multe sukcesis. Steve Jobs kaj Apple estigis pli bonan programaron por tablo-komputiloj dum la 1980-aj jaroj, tamen Mikrosofto kaptis tiom da aĉetantoj kaj klientoj, ke ĝi preskaŭ monopolis la tutan merkaton. Sony sukcesis lanĉi pli bonan videon Betamax, tamen gajnis Mitsubishi kun la ne tiel bona VHS-sistemo. Rigardu la klavaron de via komputilo, kaj se vi utiligas la QWERTY-klavaron kiel homoj en Usono kaj en Ĉinujo, vi uzas sistemon kiu postrestas rilate rapidecon kaj logikecon de la klavaro elpensita de Dvorak antaŭ 80 jaroj en 1932.

Eĉ bonaj ideoj (boneco dependas de la perceptado kaj vidpunkto de la celgrupo) ofte bezonas multajn jarojn antaŭ ol esti akceptataj. En Usono, la klare avantaĝa metra mezursistemo ankoraŭ apenaŭ utiligeblas publike. Homoj ne ŝatas rapide ŝanĝiĝi. Homoj estas skeptikaj. Homoj kutime ne volas esti inter la unuaj, kiuj brakumas novajn ideojn kaj novajn produktojn. Esploristoj montris, ke eĉ en Usono, kiu havas tradicion de akceptado de novaj ideoj kaj varoj, eble nur unu el 40 homoj volonte estos la unua el sia socia grupo por provi aŭ aĉeti ion novan.

Kiam mi diras *ion novan*, mi ne parolas pri io nur iomete nova, sed pri vera, nova elpensajo. Ne pensu pri nova gusto en trinkaĵo aŭ pri nova kapablo en via poŝtelefono. Pensu pri la unuaj tablo-komputiloj, la unuaj kontakto-lensoj, la unua telefono, la unua elektra razilo, la unua reciklado-sistemo, la unuaj sekurec-zonoj de aŭtomobiloj, ktp. Tiuj ideoj estas sufiĉe neatenditaj, novaj, ke ni povas klasifiki ilin kiel novaĵoj. Kaj en ĉi tiu difino de novaĵo estas ĉiuj varoj, produktoj, sistemoj kaj ideoj, kiuj estas novaj kaj ankoraŭ ne ofte uzataj en unu komunumo. Por la homaro ankaŭ Esperanto klasifikiga kiel novaĵo.

Esperanto estas nova ideo, eĉ se ĝi estis elpensita antaŭ

125 jaroj. Ĝi ne estas komplete nova por la ĝenerala socio, sed ĝi ja estas nova por ĝis 99 elcentoj de la tutmonda loĝantaro, kaj ĝuste pro tia noveco, Esperanto, se ĝi estos akceptita, plej probable sekvos la akceptado-vojon de novaĵoj laŭ la teorio kaj modelo de Rogers — teorio kiun mi klarigos sube. Esperanto ne malkontraŭas kaj kontraŭstaras la kutimajn vojojn de akceptado de novaj ideoj. Pro tio valoras la penon studi la manieron, laŭ kiu novaj iloj, produktoj kaj ideoj kutime, tra jaroj, jardekoj kaj eĉ jarcentoj, sukcese eniĝas en la socio.

EVERETT ROGERS KAJ LIA LIBRO

En tradiciaj fakoj de universitatoj oni ne trovas modelojn aŭ profundajn sciojn pri ĉi tiu akcepto-modelo. Ekonomiko substrekas la raciecon de la homoj, sed la akceptado de novaĵoj ne estas tiel racia. Ankaŭ ne klarigas la fenomenon tradiciaj universitataj fakoj psikologio, sociologio, politiko, merkato, komunikado kaj aliaj, kvankam ili rande interesiĝas pri la temo. La klara priskribo kaj kompreno de la akceptado de novaj produktoj kaj ideoj troviĝas en la esplorfako, nomata en la angla lingvo “Diffusion of Innovations Research,” kaj en ĉi tiu artikolo mi nomos ĝis esplorado pri disvastiĝo kaj akceptado de novaĵoj (kiel supre menciite, novaĵoj povas esti novaj iloj, produktoj aŭ ideoj).

Unu el la ĉefaj esploristoj pri tiu temo estas Everett Rogers el la Ohia Ŝtata Universitato (Usono). Antaŭ 50 jaroj li verkis sian klasikan libron *Diffusion of Innovations* (Difuzo de Novaĵoj). Mi tre rekomendas tiun libron al ĉiuj esperantistoj, kiuj volas pli bone kompreni la disvastiĝon de Esperanto laŭ strategia, ne lingvistika, vidpunkto. En la resto de ĉi tiu artikolo, mi klopodos utiligi la ideojn de Rogers el lia libro. Bonvolu memori, ke la ideoj kiujn Rogers kunigis, devenas de preskaŭ mil doktoraj disertacioj kaj miloj da fakartikoloj el pluraj studkampoj: sociologio, psikologio, merkato, komunikado, ekonomiko, geografio, politiko kaj agrikulturo. La teorio estas klare priskribata, ofte esplorata, kaj sukcese aplikata en multaj kampoj. Tamen ĝis nun ĝiaj principoj ne estas sufiĉe bone konataj de esperantistoj.

La unua nocio de la teorio de Rogers rilatas al kategorioj de akceptantoj. La fundamenta observo de la esploristoj estas, ke estas kvin fundamentaj grupoj, kiuj akceptas aŭ malakceptas novaĵojn, kaj tiuj grupoj malsimilas inter si. Krome, la novaĵo estas akceptita laŭ sinsekva ordo de, unue, Grupo I; poste, Grupo II; poste, Grupo III; poste, Grupo IV kaj finfine, Grupo V. Tio estas, Grupo II akceptas novan ideon nur **post** la akceptado de tiu ideo far homoj de Grupo I. El tiu sinsekvo de akceptado logike konkludiĝas, ke firmaoj aŭ organizoj, kiuj volas akceptigi novan ideon, vane laboras se ili provas konvinki la grupojn ekster tiu sinsekvo. Se Esperanto elspezas monon por konvinki homojn el celgrupo II, dum Grupo I ankoraŭ ne ŝatas la ideon, tio signifas ke, laŭ la teorio, mono ne estas optimume investita.

Konklude: ni esperantistoj profitos se ni komprenos tiujn grupojn. Kiuj ili estas? Kiom grandaj ili estas? Kiaj estas la homoj kiuj konsistigas tiujn kvin grupojn?

LA KVIN GRUPOJ


Rogers kaj aliaj esploristoj nomas la grupojn “Innovators” (Novigantoj), “Early Adopters” (Fruaj akceptantoj), “Early Majority” (Frua plimulto), “Late Majority” (Malfrua plimulto) kaj “Laggards” (Postrestantoj). Mi nomos ilin simple Grupo I, Grupo II, Grupo III, Grupo IV kaj Grupo V. Tiuj grupoj ne samgrandas. Grupo I estas malgranda — nur 2.5% el la celloĝantaro, Grupo II — 13.5%, Grupo III — 34%, Grupo IV — 34%, kaj Grupo V — 16%.

La membroj de ĉiu grupo povas priskribiĝi laŭ psikologiaj, sociologiaj kaj ekonomikaj kriterioj. Grupo I plej interesas nin ĉar, se la membroj de tiu grupo ne akceptos Esperanton, la membroj de la sekvaj grupoj tute ne akceptos, ĉar tutsimple, Grupo II atendas, ke aliaj homoj **unue** utiligu la novan ideon. Memoru ankaŭ, ke tiu unua grupo estas elcente malgranda: nur 2.5% el la tuta loĝantaro, aŭ 1 el 40 homoj, apartenas al ĝi. Tiu malgrandeco influos nian tutan strategion.

Kiaj estas la homoj de la ŝlosila Grupo I? Unue, psikologie ili malsimilas al aliaj homoj. Ili estas pli scivolemaj, pli kleraj, ofte havas pli da mono (kio helpas al ili aĉeti novajn produktojn, ekzemple). Ili nature ŝatas novajn ideojn kaj emas eksperimenti. Sociologie, ili ne tre komfortas en siaj lokaj komunumoj; ili serĉas eksteren. Ili legas pri homoj kaj ideoj ekster sia propra, loka kulturo. Ili pli ŝatas riskojn ol la tipa membro de ilia loka komunumo. Ili ofte ne estas plene akceptataj en siaj lokaj kulturoj kaj ofte estas rigardataj kiel iom strangaj. La plimulto (Grupoj II, III, IV, V, do 97.5% el al loĝantaro) ne akceptas ilin kiel plenajn membrojn de siaj lokaj kulturoj.

Do, la membroj de Grupo II ne akceptos Esperanton, se ili ne antaŭe vidis sukcesan akceptadon far Grupo I. Kia estas Grupo II? Dum Grupo I estas eksteruloj de la loka kulturo, la loka komunumo, Grupo II estas plene integrita en la socia kaj komunika sistemoj de la loka kulturo. Ili estas respektataj kaj aŭskultataj de aliaj homoj. Tre malsimile al tiuj de Grupo I, kiujn aliaj homoj kutime ne aŭskultas aŭ sekvas, anoj de Grupo II lerte kapablas utiligi komunikistemojn, personajn kaj amaskomunikilajn, por akceptigi siajn ideojn. Membroj de Grupo II, simile al tiuj de Grupo I, ankaŭ estas bone edukitaj, sufiĉe monhavaj kaj ŝatas novajn ideojn. Sed ili estas multe pli praktikaj, kaj kapablas klare antaŭvidi la konkretan aplikon de iu nova ideo. Laŭ Rogers, ĉi tiu grupo ampleksas pli ol kvinoble ol Grupo I, kun 13.5 elcentoj de la celloĝantaro.


Grupo III havas fundamentan diferencon disde Grupoj I kaj II. Dum homoj el la du unuaj grupoj interesiĝus pri Esperanto kiel ideo, kiel celo en si mem, eĉ kiel sankta afero, tiuj de Grupo III eble prifajfos tion. Grupo III estas praktikaj homoj. Ili ne serĉas bonan filozofion; ili serĉas ĝustajn, praktikajn aplikojn. Ili ne volas paroli pri **ideo**; ili volas havi **rezultojn**:



La teorio de Everett Rogers bonege aplikeblas en la kazo de novaj inventaĵoj teknikaj:

komputiloj, poŝtelefonoj, legiloj, ciferecaj fotiloj k.s. Sed ĉu oni povas helpo de ĝi krei strategion de popularigo de ideologio, moro, kulturo, lingvo?

Legu la finan parton de la artikolo de Dennis Keefe en la maja Ondo.



ŝparo da mono, kresko de enspezoj, pli rapida produktado, pli neŭtrala kaj justa interrilato de nacioj, malpli da problemoj ĝenerale, kontentaj dungitoj, kontentaj akciistoj, sukcesaj studentoj, psikologia sano por maljunuloj. Ĉiu havas sian celon, ĉu komercan ĉu idealistan, tamen konkretan celon kiu rilatas la uzon kaj la utiligon de la ideo, sed kiu ne tuŝas la ideon mem. Tiu grupo havas alian grandan trajton: ili volas havi kompletajn solvojn, senriskajn solvojn kaj profitdonajn rezultojn. Ili volas vidi, ke nova ideo vere funkcias, ke ĝi **jam** havas la tutan infrastrukturon por sukcesigi ĝin, kaj ke ne estas risko, ke post la ekuzo de la ideo, ĝi eble malsukcesos.

Tiaj homoj de Grupo III gravas ankaŭ, ĉar ofte ili decidas por universitatoj, por lernejoj, por registaroj, por firmaoj. Ili estas decidantoj, decidestroj, decidistoj. Ili havas la potencon, la monon, kaj la respondecon decidi por siaj organizoj. Ili ne ŝatas eksperimenti; ili volas vidi la rezultojn de antaŭaj eksperimentoj. Ili ne ŝatas montri la novan vojon. Ili preferas atendi. Atendi longan tempon ĝis ili vidas pruvojn, multe da pruvoj, ke la ideo bonas, bonvojas, kaj antaŭ ĉio, ke ĝi jam sukcese uzeblas. Grupo III estas tre granda, kun ĉirkaŭ 34% el la komunumo, kaj, kompreneble, granda parto el ili ne estas decidistoj, sed individuoj kiuj respondecas nur pri si mem aŭ pri siaj familioj, tamen tiuj individuoj havas la samajn psikologiajn kaj sociajn trajtojn kun la decidistoj — ili preferas atendi ĝis kiam nova varo, produkto aŭ ideo estos jam perfektigita kaj preta, sen risko, por aĉeto kaj utiligado. Ili ne akceptos Esperanton se tiu lingvo ankoraŭ ne estos uzpreta. Uzpreta por ĉiaj uzoj: vojaĝi al Parizo, diplomigi ĉe universitato kaj esti dungita per tiu diplomo, rigardi ĉiujn videoludojn en Esperanto ktp, ktp.

Laŭ mi, estus tre pozitiva paŝo en la Esperantaj movadoj, se ni pli atentus tiujn trajtojn de Grupoj I, II, kaj III. Tro ofte ni provas konvinki homojn, kiuj apartenas al la pli pragmatikaj grupoj, speciale al Grupo III. Laŭ la teorio de Rogers, tiaj homoj tute ne atentus nin, ĉar ni parolas pri bonaj ideoj, belaj ideoj, kiuj tamen ne povas estis praktike starigitaj nun, kun rezultoj nun. Tiaj homoj de Grupo III ne decidus favore al ni, eĉ se ili kredus, ke ni havas la plej bonan ideon de la tuta mondo. Ili ne decidus laŭ kriterioj de bona aŭ nebona ideo; ili elektas vojojn laŭ iliaj praktikaj, senriskaj aspektoj.

Se Grupo III ne atentus kaj akceptas nin, ni tute forgesu Grupojn IV kaj V, kiuj reprezentas la alian duonon de la celloĝantaro. Ili sekvas, nur sekvas. Grupo V sekvas Grupon IV, kiu sekvas Grupon III, kiu sekvas Grupon II, kiu ekpaŝos nur post kiam ili vidas sufiĉe da utiligantoj en Grupo I. Krome, anoj de Grupo V akceptos Esperanton, nur se ili estos devigataj akcepti ĝin, ekzemple, kiam ili ne plu havos alian elektelecon. Ekzemple, kiam neniu plu parolos la anglan en la flughaveno de Parizo aŭ Pekino.

(Daŭrigota)



Bruselo ne deziras sinesprimi pri la sendependeco

de Dafydd ab Iago

Proksimiĝas la tempo de la plebiscito en Skotlando pri la estonteco de la lando. Ĉu resti aŭ ne en Britio? Unu el la plej grandaj demandoj de la afero estas, ĉu la nova lando restos en Eŭropa Unio aŭ ne. Tamen Bruselo ne emas respondi al la demandoj eĉ, aŭ speciale, de parlamentanoj.

Unu el tiaj respondoj venis de Maroš Šefčovič, membro de la Eŭropa Komisiono. “Nuntempe la komisiono ne povas esprimi sian opinion pri la afero”, — respondis Šefčovič al tre bona demando de kataluna deputito. La parlamentano volis scii kio okazos se Skotlando iĝos sendependa, kompreneble pro tio, ke multaj homoj, aŭ almenaŭ la plejparto de la politika klaso en Katalunio, volas sendependiĝi de Hispanio.

Šefčovič, aŭ, pli ĝuste, liaj oficistoj, evitis respondi klare — tradicia maniero de Brusela burokrato. Laŭ la komisionano, li ne povas fari alimaniere, ĉar ne klariĝis la kondiĉoj de la plebiscito, kaj ĉar li ne konas la naturon de la rilato inter, unufanke, Skotlando kaj tio kio restos en Britio kaj, aliflanke, Eŭropa Unio. Šefčovič nur aldonis, ke la membro-ŝtatoj decidu pri la traktatoj kaj la akcepto de novaj ŝtatoj.

En Skotlando mem la demando jam fariĝis parto de la kampanjo. Tre rapide, la prezidanto de la Skotlanda Nacia Partio kaj membro de la Eŭropa Parlamento Ian Hudghton anoncis, ke la respondo de la komisiono donas la pravon al la partio.

“Estas fakto, ke Skotlando, same kun la restaĵo de Granda Britio, jam estas membro de EU... Skotlando kaj la restaĵo de Britio ludos siajn rolojn kiel samrajtaj membro-ŝtatoj, reformante la Traktatojn por agnoski la estontajn ŝtatojn post sendependiĝo”, — anoncis Hudghton al la gazetaro.

Hudghton akuzas tiujn partiojn kaj politikistojn, kiuj kontraŭas sendependecon kaj disvastigas timon pri tio, kio okazus post la sendependiĝo. Inter tiuj homoj estas altpostenaj oficistoj en Londono, kiuj notas, ke Hispanio eĉ hodiaŭ rifuzas agnoski Kosovon kiel sendependan ŝtaton, kvankam ĝi sendependiĝis en 2008. La starpunkto de Madrido, laŭ tiuj Londonaj oficistoj, signifas ke Kosovo ne povas peti membrecon eĉ kiam Serbio sukcese aliĝos. Laŭ tiuj oficistoj, Hispanio rifuzas agnoski la sendependecon de Skotlando pro timo, ke Katalunio kaj Eŭskio petos la samon.

Tamen lastatempe, la eksterlandministro de Hispanio José Manuel García Margallo pli zorge formulas la starpunkton de sia lando. “Se la du partioj en Britio konsentas, ke ĝi konvenas

kun la konstitucio skribita aŭ neskribita, Hispanio havos nenion por kontraŭdiri”, — diris la ministro. Estas klare, ke Londonaj oficistoj iom tro facile kaj libere interpretis la opinion de Hispanio.

Alia punkto en ĉi tiu afero estas la facileco kun kiu Londono akceptas la rajton de popolo decidi pri sia propra estonteco. Kvankam la ĉefministro David Cameron provas influ la formon de la plebiscito, oni ne neas la rajton de Skotlando decidi.

Tute alie estas en aliaj landoj. En la sama gazetara konferenco, la hispana eksterlandministro emfazis, ke koncernas nur Britio kaj Skotlandon se ili permesas sendependecon. Tamen la konstitucio de Hispanio, li diris, malpermesas sendependiĝon pro la “esenca unueco” de Hispanio. Tamen estos ŝoko se post sia sendependiĝo Skotlando devos re-aliĝi al la Eŭropa Unio. Skotlandanoj, same kiel irlandanoj, anglanoj kaj kimranoj (kaj ankaŭ danoj) estas civitanoj de EU ekde 1973. Tradicie, Skotlando estas multe pli favora al la Unio ol Anglio. Sed ĉu post sia sendependiĝo, Skotlando devos re-aliĝi, kaj ĉu post Serbio, Montenegro kaj eĉ Turkio? Bedaŭrinde, la Eŭropa Komisiono timas klare respondi pri la temo.

Pri atingoj kaj fiaskoj

Bedaŭrinde, en la Ronda Tablo (*LOdE*, 2012, №2) neniu mencias la plej furoran kampanjon de la lastaj jaroj: *Change*, por kiu multaj esperantistoj deturnis tempon kaj forton el aliaj agadoj kaj kiu kreis multe da seniluziĝo.

Oni ne preferas emfazi la simplan daŭrigon de silenta, sinoferema agado de esperantistoj kiuj daŭrigas la longjarajn ĉeestojn — mi celas la atingajojn pri kiuj ni fieras de jardekoj (Vikipedio, radioelsendoj, tradukoj de elstaraj nacilingvaj verkoj).

Male la listo estas serio da **mi** kaj **vi**; **ili** kaj **ni**. La ĉefa problemo de esperantistoj estas ke ili ne konas la verbon “pli-firmiĝi”. Nur en krizomomentoj ili eltiras la plej fortan reagemon.

Sed gravaj atingoj de la pasinteco formortas, ĉar oni entuziasmiĝas pri gravaj novaj atingeblecoj, kiuj bedaŭrinde ofte riveliĝas blufado aŭ kiuj estas ligitaj al personoj kiuj bedaŭrinde ne estas eternaj.

Laŭ mi Esperanto transvivos malgraŭ la esperantistoj.

Carlo Sarandrea

Italio / Itallando / Italujo

(Por kontentigi ĉiujn, mi uzas ĉiujn formojn.)

Demando? Respondo!

Demando: Mi finlegis la raporton *Esperanto — la plej bona propedeŭtiko (laŭ la materialoj de Internacia konferenco la 13-an de aprilo 2007 en Moskvo)*. Nun estas kvin jaroj post la konferenco. Mi scivolemas: ĉu la konferenco ŝanĝis ion en la praktiko? Kio estis la respondo de la ministro pri klerigo kaj scienco, A.A Fursenko al la letero de profesoro G.M. Ŝilo de la 24a de aprilo 2007? Mi ege ŝatus legi artikolon en *La Ondo de Esperanto* pri la postaj spertoj de la konferencanoj.

Rudi Koot

Respondo: Bedaŭrinde, okazis neniu ŝanĝo kaj neniu reago de la ministro Fursenko. Ankaŭ ne estas iuj informoj pri uzo de la ekspertizo flanke de nia samideanaro. Malgraŭ la unika karaktero de la ekspertizo.

Gennadij Ŝilo

Esperanto estas la 64a lingvo ĉe “Google Translate”

Maŝintradukado atingis novan mejloŝtonon, kiam la 22an de februaro la plej konata interreta tradukilo Google Translate (<http://translate.google.com>) eksubtenis Esperanton kiel sian 64an lingvon. Entuziasmon de la esperantistoj plifortigis la aserto, ke ilia lingvo donas multe pli bonajn rezultojn ol aliaj lingvoj kun same malmultaj trejnodatumoj, kaj ke tio estis la ĉefa kialo por la frua lanĉo. La tradukilo de Google tamen havas siajn kapricojn, pro kiuj oni povas facile konsenti nur pri la grava reklama efiko por Esperanto, ne tiom pri la kvalito de la tradukoj.

Ekzistas maŝintradukiloj regulbazitaj, kiuj uzas vortarojn kaj gramatikajn regulojn verkitajn de lingvistoj, kaj statistikaj, kiuj uzas algoritmojn verkitajn de programistoj per kiuj la maŝino aŭtomate lernas el granda kvanto de dulingvaj tekstoj jam antaŭe tradukitaj de homo. La Google-Tradukilo estas statistika, dum ĉiuj pli fruaj maŝintradukiloj por Esperanto estis regulbazitaj. Tio ŝuldiĝas precipe al manko de grandaj dulingvaj tekstaroj, kiuj ekzistas ĉefe por la plej prestiĝaj naciaj lingvoj (ekzemple, tradukaĵoj pretigataj de UN aŭ EU).


Serĉilo kiel Google tamen disponas pri kopioj de multegaj retpaĝoj, kaj ĝi ankaŭ ciferecigis multajn librojn. Ŝajne ĉefe laŭ tiuj tekstoj ĝi “lernis” Esperanton, kaj tial ne bonas uzi por testado frazojn kiuj jam troviĝas plurlingve en la reto (ekzemple, tekstojn de “lernu!”). Grava rimarko estas ankaŭ ke la tradukado al/el Esperanto ĉiam okazas per la angla kiel interlingvo (ĉar nur por tiu lingvoparo oni kolektis sufiĉajn trejnodatumojn). Tion konfirmis mem dungito de Google, sed tion pruvas ankaŭ jena facila eksperimento: Petu al Google traduki el Esperanto al la rusa la frazon «La vorto “obvious” ne ekzistas en Esperanto». La respondo estas «Слово “очевидно” не существует в эсперанто».

En direkto angla-Esperanto aperas multaj gramatikaj eraroj, ĉar por la maŝino vorto kun akuzativa finaĵo kaj vorto sen ĝi estas tute sendependaj. La direkto Esperanto-angla suferas pro la riĉa morfologio de Esperanto, pro kiu “skribmaŝino” tradukiĝas, sed “maŝinskribo” ne.

En testo kun 16.000 radikoj (ĉefe PIV-aj), la tradukilo tamen rekonis duonon. Ĝi ankaŭ bone elturniĝas pri la ĉapelitaj literoj, ĉar akceptiĝas “ŝipo”, “sxipo”, “shipo”, kaj eĉ “sipo”, kvankam tradukoj povas varii (“ĉeno” = “chain”; “cxeno” = “string”), kaj nerekonita derivaĵo “ŝanĝaĵo” tradukiĝas “Shanghai”. El landonomoj Google uzas “Italujo” sed “Ĉinio”, rekonigis tamen ĉiam ambaŭ formoj. El nombraj adverboj ĝi komprenas nur “unue” ĝis “kvare”. La multaj artikoloj en Vikipedio influis ĝian lingvouzon, ĉar “User is drunk” tradukiĝas kiel “Vikipediista estas ebria”. Enŝteliĝis ankaŭ iuj hispanaj vortoj, pro kio “unjustified” tradukiĝas kiel “injustificada”. Tiu mistraduko cetere aperas ankaŭ en maŝintradukitaj trompmesaĝoj, kiujn esperantistoj jam komencis ricevadi.

En komparo kun aliaj tradukiloj en la direkto angla-Esperanto, Google Translate donas pli bone legeblajn tradukojn ol Trukilo (traduku.net) kaj Esperantilo (esperantilo.org), sed kompareblajn kun GramTrans (gramtrans.com), Apertium (apertium.org) kaj Elitrad (traduku.net).

Ĝia forta flanko tamen estas la ligiteco al aliaj servoj de Google: Voĉon de angle parolata video en YouTube nun eblas aŭtomate rekonigi kaj la subtekstojn tradukigi en Esperanton.



The screenshot shows the Google Translate blog page. At the top, it says "The Official Google translate blog" and "The official source for news on Google's translation technologies". The main heading is "Tutmonda helpingo por ĉiuj homoj" (Worldwide help for everyone). The date is "Wednesday, February 22, 2012 | 1:35 PM". The text of the post discusses the addition of Esperanto to Google Translate, mentioning Ludovic Lazarus Zamenhof and the history of the language. It also includes a Facebook fan box for Google Translate with 153,863 users.

Provu spekti la paroladon de Steve Jobs en Stanford ĉe <http://tinyurl.com/jobsc> (klaku la ruĝan butonon “CC” sub la video, elektu “Traduki priskribojn BETA” kaj en la falmenuo Esperanton).

Marek Blahuš

La Bolonja grupo centjariĝos

Antaŭ cent jaroj, en 1912, la fama geologo d-ro Achille Tellini fondis en Bolonjo (Italio) la Esperanto-grupon Emilia Esperanto-Societo; en 1949 okazis la refondiĝo kun la nomo Bolonja Esperanto-grupo “A. Tellini-Grupo”.

Ekde la 1a ĝis la 3a de junio la grupo aranĝos gravan kunvenon por festi la centjariĝon de la fondo de la grupo kaj samtempe de la Katedro de Esperanto.

La tritaga programo de la jubilea aranĝo enhavos, inter alie, malfermon de historia fotoekspozicio “Unu jarcento de esperantista historio en Bolonjo” kaj malfermon de la oficiala kunveno; posttagmeze viziton de la urbocentro kaj de la nova Historia urbo-muzeo. Tuttaga ekskurso konkludos la programon.

En la historio de la Bolonja Esperanto-grupo menciindas la okazigo de pluraj gravaj aranĝoj, precipe de kvar organizitaj italaj naciaj kongresoj (1920, 1952, 1986, kaj 2000) kaj de la Jubilea UK en 1955.

Mario Amadei

La malnova foto montras la pioniran Esperanto-grupon en Bulonjo en la fondoĵaro 1912.



Bitoteko en Hispana survoje al Europeana!

Ekde la 30a de januaro la Bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio aperas en *Hispana*: <http://hispana.mcu.es/es/estaticos/contenido.cmd?pagina=estaticos/presentacion>

Hispana estas projekto de la Ministerio pri Edukado, Kulturo kaj Sporto de Hispanio celanta arigi la hispanajn bitotekojn de arĥivoj, bibliotekoj kaj muzeoj, inter kiuj elstaras la bitotekoj de hispanaj universitatoj kaj de la Aŭtonomaj Komunumoj.

Hispana plenumas je landa nivelo la samajn funkciojn kiel *Europeana*, kaj ĝi kolektadas ĝis nun la dokumentojn de 162 bitotekoj, inter kiuj la nia. Tio signifas pli da videbleco por nia kulturo ĝenerale kaj la pli konkretajn avantaĝojn, ke eblos aliri niajn dokumentojn rekte el la ministeria retejo (kio alportos al ni iom da prestiĝo) kaj fari serĉon en ĉiuj kolektitaj bitotekoj samtempe. Ekzemple, se oni serĉas la vorton “Esperanto”, *Hispana* montras 1483 rezultojn, el kiuj 1451 venas el Bitoteko. Sed ni vidas, ke kelkaj aliaj datenbankoj havas ankaŭ dokumentojn rilatajn al la serĉo, kiel, ekzemple, RACO (Revistes Catalanes amb Accés Obert), kiu disponas ok.

Ĉi tiuj bitotekoj alportas, pere de *Hispana*, siajn dokumentojn al la projekto *EuropeanaLocal*, kies nacia kunordiganto estas la Ministerio. *Hispana* ankaŭ prizorgas adresaron pri la bitprojektoj disvolviĝantaj en la lando. Ĝi iĝas do taŭga kunordigilo inter la diversaj registaraj aŭ privataj institucioj, kiuj entreprenis bitprojekton.

Ĉi-rilate, por ke la dokumentoj de nia Bitoteko estu ankaŭ en *Europeana*, ties bibliografiaj rikordoj devas plenumi certajn kondiĉojn pri specifaj metadatenoj, kiujn ni ankoraŭ ne uzas. Ni devas do adapti nin al la postuloj de *Europeana*.

Ana Manero

Notoj:

Bitkolekto. Kolekto de bitaj aŭ ciferecaj dokumentoj.

Bitoteko. Bit biblioteko, cifereca biblioteko.



Nova Esperanto-Domo en Malago

(HeKo) La 12an de oktobro 2012 okazos inaŭguro de la Esperanto-Domo en Malago, Andaluzio. Tiutage la Konsulino de la Esperanta Civito, Marie-France Conde Rey, tondos la inaŭguran rubandon kaj faros la festparoladon. Sekvos vizito de la Esperanto-Domo kaj prezento pri ĝia rolo, fare de la prezidanto de Esperanta Naturamikaro, Julio Herrero. Posttagmeze kunvenos la Civita Senato en ordinara sesio.

La 13an-14an disvolviĝos la unua Astrologia Semajnfino en Esperanto (ASE). Temas pri studrondo iniciatita de Francisco Xavier Martín Gomez, Mariangela Varese kaj aliaj.

Kial mi iĝis dumviva membro de UEA?



Komence de 2008, tuj post mia memlernado de Esperanto per la lernolibro de Boris Kolker, mi unuafoje vizitis la retejon de UEA kaj priensis aliĝon al ĝi. Tiam mi rezignis. Por kio? La revuo *Esperanto* raportas precipe pri esperantaĵoj kaj Esperantujo, do aboni ĝin ŝajnis al mi iom stranga — mi ja lernis la lingvon ne por legi pri ĝi, sed por ekscii pli per ĝi! Partopreni kongreson mi tiam ne planis, kaj la aliĝo bildiĝis kiel iom nebula afero — mi ja dum longa tempo ne membriĝis en iu ajn organizaĵo, post mia neevitebla aniĝo en Tutsoveta Junpionira Organizo antaŭ ĉirkaŭ kvaronjarcento.

Pasis kvar jaroj de mia esperantista vivo. Mi daŭre restas solulo, ne partoprenante iujn ajn forumojn kaj eĉ ne kontaktante samurbajn esperantistojn. Fakte por mi Esperanto estas lingvo per-reta. Legi, traduki kaj verki en Esperanto estas mia preferata vojo en ĉi tiu tutmonda lando.

Tamen mi pli kaj pli ofte pensis pri utileco de UEA-aniĝo. Kial?

Unue, mi aĉetas ĉiam pli da libroj en la libroservo de UEA, verŝajne la plej bona kaj abunda en Esperantujo. Lastfoje mi pagis ĉirkaŭ 300 eŭrojn kontraŭ 15 varoj kaj eventuale mi finlegos ĉion post unu jaro. Kaj mi jam notis pliajn librojn aĉetendajn. Do dek-procenta rabato, kiun ĝuas UEA-membro, estas sufiĉe alloga afero por librovermo, ĉu ne?

Due, finfine mi ricevis eksterlandan pasporton kaj firme decidis komenci mondvojaĝadon. Mia unua celo estas ĉi-jara UK en Vjetnamio. Kaj jen mi trovis plian avantaĝon en la UEA-membreco — aliĝkotizo malpli alta je 35 eŭroj. Bagatelo, sed agrabla, kiel oni diras en Ruslando!

Trie, ĉiam pli ofte mi alfrontas bezonon trovi spertulojn pri certa fako en Esperantujo. Guglo, Ipernity kaj aliaj retejoj certe helpas pri tio. Sed nur la fakdelegita reto de UEA havas pli ol 1800 fakulojn, kiujn oni povas sufiĉe facile trovi kaj kontakti. Tiu argumento decidis ĉion. Mi povas plu vivi sen rabatoj, sed tia datumbazo estas por mi ne preterebla. Do mi aĉetas aliron al ĝi! Kaj plej bona solvo ŝajnas al mi dumviva membreco — ja kontraŭ nur tricent eŭroj mi dum mia tuta (espeble sufiĉe longa) vivo ricevados ĉiujn menciitajn eblojn plus pdf-versiojn de *Esperanto* kaj *Jarlibro*. La sumo ne tro grandas por longatempe cerbumi pri ĝi.

Mi povas menci i ankaŭ aliajn kialojn, ekzemple la ĉiaman inklinton al subtenado de bonaj aferoj, la deziron helpi al la ĉefa Esperanto-organizaĵo, ktp. Ili ja vere ĉeestis, sed ne estis solaj instigmotivoj. Mi konsideras min realisto-idealisto, kiu strebas atingi idealismajn celojn per praktikaj agoj. Nu, mi iĝis dumviva membro de UEA kaj registriĝis kiel fakdelegito pri la historio de Siberio, ĵurnalismo kaj publikaj rilatoj.

La projekto Esperantistoj-Ĵurnalistoj, lanĉita de mi, malgraŭ diversaj obstakloj jam helpis al kelkaj samideanoj perlabori ĉirkaŭ 1000 eŭrojn — tute reala mono, kiun ili gajnis danke al sia lingvokono. Nun mi preparas plian per-Esperantan projekton, kiu celas precipe komercistojn kaj oficistojn. Danke al ĝi interesatoj, kaze de sukceso, povos gajni milojn, dekmilojn da eŭroj. Kaj mi esperas, ke la datumbazo de UEA helpas min en ĉi tiu afero. Sufiĉas babilaĉi pri utileco de Esperanto, venis tempo por uzi ĝin!

Stanislao Belov

Aleksandro Herzen: Iom da suno en friska akvo

de Alen Kris



Antaŭ ducent jaroj, la 25an de marto (Gregorie: la 6an de Aprilo) 1812 naskiĝis Aleksandro Herzen (ruse: Aleksandr Ivanoviĉ Gercen, 1812–1870) — eble, la plej originala figuro en la listo de la rusaj herooj de l' spirito de la 19a jarcento.

Infano ne tute legitima de tute fremdeca patro, li portis la inventitan germanan nomon, sed profitis privilegiojn de nobelo.

Infano de siaj epoko kaj lando kaj samtempe eŭropano, li adoptis, pli ĝuste, adaptis la filozofian modon germanan, la francan socian doktrinon kaj la anglan pasion al natura scienco. Sed li ĉiam restis kritika en la apliko de iuj ajn tendencoj aŭ sekvo de iuj ajn skoloj. Oni povas diri: li ĉie sekvis sian propran padon kiu ofte kondukis lin malproksimen de la rutina vojo.

Ĉu naturdevena, ĉu edukita, lia sendependeco faris lin unika silueto sur la intelekta horizonto de la jarcento.

Herzen estis idea okcidentano, sed tiom kritika rilate al la disvolvo de la Eŭropa civilizacio, ke lia situo povis, laŭvole, konsideriĝi kiel plene kontraŭeŭropista. Samtempe, li ne ĉesis esperi pri la rusa komunumo... Fidela al sia intelekta skrupulco, li tamen ridetis skeptike, kiam lia amiko Miĥail Bakunin alvokis sin bazi sur la kamparana komunuma saĝo.

ANKORAŭ kiel knabo, Herzen ĵuris lukti por la libero de sia patrio. Scenoj de reala vivo, kiujn li observis ĉirkaŭe, kaj la receptoj de solvo de sociaj problemoj, kiujn li legis en francaj libroj, formis lian projekcion de vivo kaj li iris laŭ tiu projekcio.

Studento de la Moskva universitato, Herzen sin koncentris sur matematiko kaj naturaj sciencoj. Tre tipa por li elekto. Lia denaska inklino al historio kaj literaturo postulis restarigi ekvilibron: specialigo mutilas intelekton.


Post sukcesaj studoj, nelonga ŝtatservo, fruktodona literatura laboro kaj du ekziloj kaŭze de “kontraŭleĝa aktivado”, Herzen forlasas — por ĉiam — Ruslandon. Estas la jaro 1847. (Herzen havas 35 jarojn.) Li loĝas komence en Francio, poste (de 1852) en Anglio. Tie, en Londono, li lanĉas sian faman projekton de presa propagando: ege gravan iniciaton por la progresista evoluo de sia patrio.

La titana figuro de Herzen sin apertas trans la ekstrema — mirinda — riĉeco de liaj komunikaj rilatoj. La plej grandaj intelektaj kaj moralaj aŭtoritatoj de Eŭropo de plej diversaj tendencoj kaj politikaj opinioj fieris esti liaj amikoj. Soleca kaj sendependa menso, li ne estis izolita de la kompleksa de ideoj kiuj satigis lian penson pli freŝe kaj pli varie ol tiun de multaj famaj sampartianoj.


Herzen kiel socia pensulo kredis la socialisman futuron de la homaro, kio estis sufiĉe komuna kredo de la epoko. Sed, kontraŭ tiu konsola optimismo, li tute ne kredis favoran evoluon de la Okcidenta civilizacio kiun li rigardis deinterne. “Degenero”. Per tiu vorto li difinis la socian proceson en Eŭropo post la franca krizo de 1848. Degenero paŝanta al sistema degenerado. (Kaj kion vi volas? Kion vi povas atendi de la landoj posedataj de butikanoj kaj komercistoj?)

Herzen kiel memora kaj beletra verkisto meritas specialan mencion. Lia lingvaĵo preterpasas la tradicion de Puŝkin. Neregula, originala, kiel la aŭtoro mem, la lingvaĵo de Herzen produktas absolute siaspecan, neripeteblan efekton. Al tiuj, kiuj tute ne konas lin kiel aŭtoron, mi rekomendas trovi kaj legi *Pasintecan kaj pensojn*, memorverkaĵon kristaligintan lian sperton en unikan dokumenton de historio, valoran specimenon de literaturo kaj sintezan produkton de potenca menso.

Se oni devigus min doni bildan nuancon al tiu fenomeno de kreo kaj personeco, kiu ĉirkaŭprenis en si la heroon de mia kurta skizo, mi preferus tian: iom da suno en friska akvo.



Kolokol (Sonorilo), la legenda gazeto de Herzen kaj Ogarjov.



Kion ni legos en 2012?

La redakcio de *La Ondo* sendis al pluraj eldonejoj demandon pri eldonaĵoj, aperontaj en la 2012a jaro. Preskaŭ ĉiuj volonte konsentis respondi, dum kelkaj skribis, ke ili ne havas eldonplanon aŭ preferas ne diskonigi ĝin. Kaj nun konatiĝu kun la subaj listoj kaj planu viajn aĉetojn.

Peter Baláž el *Espero* (Slovakio)

Espero funkcias en Partizánske (Slovakio) ekde 2003. Jam aperis 20 libroj, 4 DVD-Rom, 2 KD-ROM, 1 muzika KD.

Eldonotaĵoj por la jaro 2012:

- *Historio de UEA*: impona verko de Ziko van Dijk;
- nova poemaro de juna talentita itala aŭtoro Nicola Ruggiero;
- lernolibro de Esperanto en la slovaka *Esperanto za tri mesiace*, traduko de la ĉeĥa lernolibro de Petr Chrdle;
- reeldono de la lernolibro de Esperanto en la slovaka *Esperanto priamou metodou* de Stano Marček.

Por E@I okazos eldonoj:

- dua, plivastigita, korektita eldono de la verko *Komputeko* (angla-Esperanta terminaro de komputilaj vortoj) de Yves Nevelsteen;
- dua eldono de *Detala gramatiko de Esperanto* de Bertilo Wennergren;
- kvara eldono de DVD-Romo *Esperanto elektronike*.



Paul Peeraerts el FEL (Flandrio, Belgio)

Malgraŭ iom reduktita oficista stabo, la eldonejo de Flandra Esperanto-Ligo daŭre eldonas verkojn de renomaj aŭtoroj. Komence de 2012 aperis *La kronprincdzino* de John Francis — nova rakonto pri intrigoj, miskomprenoj kaj sekretaj bataloj en mezepoka etoso! En la presejo nun estas *Bildvortaro*, multe ampleksigita pli ol 600-paĝa versio de la iama bildvortaro de Rudiger Eichholz, bazita sur la 6a eldono de la granda Duden-Bildvortaro.

Gersi Alfredo Bays el *Fonto* (Brazilo)

La eldonejo *Fonto* (Chapecó, Brazilo) aperis en 1980, kaj ekde tiam ĝi eldonis pli ol 120 librojn.

Ĉi-jare jam eldoniĝis la kvara volumo de *Antologio Latina* kaj la dua eldono de la romano *Sed nur fragmento* de Trevor Steele.

En preparo estas la dua eldono, rekompostita de *Cent jaroj da soleco* de Gabriel García Márquez, tradukita de Fernando de Diego, kiu unue aperis en 1992; *Tartufo* de Moliero en la traduko de André Cherpillod; *Danĝeraj rilatoj* de Choderlos de Laclos, tradukita de Jean-Luc Tortel; *Ferramentas gramaticais* de André Cherpillod en la portugala traduko de Gersi Alfredo Bays; kaj *Renkontoj dumvoje* de la bulgara verkistino Elena Popova. Kaj aliaj, eble...



Hori Jasuo el *Horizonto* (Japanio)

Horizonto estas mia persona eldonejo. En aŭtuno 2011 mi eldonis mian propran libron *Esperanto-esearo de mondvojaĝanto s-ro Hori* en la japana, kaj ĝiaj 500 ekz. elĉerpiĝis en januaro 2012. En 2012 mi jam eldonis la libron *Miaj vojaĝoj tra la mondo* (Esperante, 400 ekz.) kaj planas eldoni la duan volumon de *Esperanto-esearo de mondvojaĝanto s-ro Hori* (japane) en aprilo kaj *Raportojn el Japanio 15* (Esperante, 400 ekz.) en junio. Mi havas aliajn planojn, sed nun tiuj ne estas certaj.

Irmí Hauptenthal el Edition Iltis (Francio)

En sia eldona programo por la jaro 2012 Edition Iltis povas anonci kvar tuj aperontajn novajn titolojn:

- Gonçalo Neves. *Zamenhof kaj Volapük*;
- Hermann Sudermann. *La ekskurso al Tilsit*. El la germana tradukis Reinhard Hauptenthal;
- Johann Martin Schleyer. *Rudolf und Hermine oder Die Liebe macht erfinderrisch* en la germana, kaj *Rudolfo kaj Hermina aŭ La amo igas inventema* (tradukis Reinhard Hauptenthal) en Esperanto.

Petro Chrdle el KAVA-PECH (Ĉeĥio)

KAVA-PECH (ĉeĥa mallongigo, kiu signifas “Kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle”) fondiĝis en 1992, aperigis 150 librojn, el ili preskaŭ duono tuŝas Esperanton (verkitaj en Esperanto, tradukoj en Esperanton aŭ el Esperanto ĉeĥen, lernolibroj de Esperanto, vortaroj).

Nur du titoloj jam maturiĝis ĝis tia grado, ke mi povas anonci kun bona konscio ilian eldonon en 2012: Karel Čapek: *R.U.R. Rossumaj Universalaj Robotoj* en la serio *Oriente-Okcidento*; kaj Petr Chrdle: *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*, la tria aktualigita eldono.

Kooperativo de Literatura Foiro (Svislando)

La nuntempe plej grava libroeldona projekto de LF-koop, apud la kvar periodaĵoj, estas la plurcentpaĝa *Historio de la esperanta literaturo* de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer. Ĝi aperos ene de la trijara laborplano 2012–2014.

Vilhelmo Lutermano el MAS (Francio)

La Monda Asembleo Socia (MAS) ne estas vere eldonejo, sed rete funkcia organizaĵo, kies membroj interalie eldonas siajn verkaĵojn kaj tradukaĵojn. Kvankam ĝi fondiĝis en la jaro 2005, ĝiaj membroj eldonis jam relative multajn librojn, en marto 2012 nia 77a libro estas presata. La libroj de tiu ĉi jaro 2012 estas:

74. Frederiko Engelso. *La evoluo de la socialismo de utopio al scienco*. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano.

75. Georgo Fulberto: “*La kapitalo*” *koncize*. Kun recenzo de Lucas Zeise. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano (resumo de la tuta *Kapitalo*).

76. Ivan Efremov. *Tais el Ateno*. El la rusa tradukis Jurij Finkel.

77. Berto Breĥto. *Me-ti, libro de turnoj*. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano.

78. Eddy Raats. *Rakontoj*.

Kromaj libroj, ekzemple, tradukitaj el la rusa kaj germana, estas planitaj, sed oni ne povas klare diri nun, kion la verkemaj MAS-anoj ankoraŭ prezentos dum tiu ĉi jaro. La lastaj tri jaroj montras, ke MAS aperigas mezume du librojn monate (sen kalkuli la nur rete aperigitajn tekstojn).

Ulrich Becker el Mondial (Usono)

La eldonejo Mondial havas sian sidejon en Novjorko (Usono). Ĝia Esperanto-fako (www.librejo.com) eldonas ĉiujare kvin ĝis dek titolojn. En 2012 ni jam eldonis du librojn kun tekstoj originale verkitaj en Esperanto:

— Jorge Camacho. *La silika hakilo*: poemaro.

— Liven Dek. *Ne ekzistas verdaj steloj*: 60 mikronoveloj kun suplemento.

Krome aperos en 2012 tri libroformaj eldonoj de Beletra Almanako, la unua en februaro/marto, la dua en junio, kaj la tria en oktobro.

En 2012 la Esperanto-fako de Mondial draste plilarĝigos siajn ofertojn de elektronikaj libroj (www.bitlibroj.com), i.a. per disponigo de pli da titoloj en la populara ePub-formato, kaj pli da retaj bitlibraj vendejoj ofertantaj ilin.

Vito Markovo el EFK SAT (Francio)


Eldona Fakto Kooperativa de SAT fondiĝis en 2007. En 2012 devos aperi DVD-forme la multlingva dokument-filmo *Esperanto* de Dominiko Gaŭtiero. Krome antaŭvidita estas reeldono de *ABC de Sennaciismo* de Kolĉinski kaj *Manifesto de Sennaciistoj* de Lanti ene de sama libro kun rekuntekstiga enkonduko de Gary Mickle, kaj aprile aperos (okaze de teatraĵo dum SAT-Amikara kongreso) traduko de *Karotokapo* de Jules Renard. Aliaj malpli maturaj projektoj estas survoje, interalie, retlibraj eldonoj.

Gerrit Baveling el VoKo (Nederlando)

Entute aperis ekde 1980 ĝis nun ĉe VoKo 55 broŝuroj kaj libroj en du serioj: “Voĉoj Kristanaj” ligitaj al kristanismo en plej vasta senco; kaj “Voko-numeroj” — poemoj, eseoj, literaturo

Ĉi-jare jam aperis ĉe VoKo la traduko de Pieter-Jan Doumen el la mezepoka nederlanda *Karlo kaj Elegasto* — romaneto en poezia formo pri Karolo la Granda. Estas presata nun la traduko de la romano *Urug* de Hella S. Haase, kiun el la nederlanda tradukis mi mem.

Pri planoj koncerne estontajn eldonojn kutime mi ne donas informojn.



Nikolao Hohlov

La 1891a jaro estis feliĉa por la Esperanta poezio: tiujare naskiĝis Kolo-
mano Kalocsay, Julio Baghy, Hendrik
Adamson, Georgo Deŝkin... Kaj la 31an
de januaro 1891 en Moskvo naskiĝis
Nikolaj Ivanoviĉ Ĥohlov, famiĝinta
inter esperantistoj kiel Nikolao Hohlov.

En Moskvo li lernis en gimnazio kaj
en komerca lernejo kaj eklaboris en la
ĉefpoŝtejo. En la revolucia jaro 1917
Hohlov konatiĝis kun la polino Vera, kiu
baldaŭ iĝis lia edzino. La juna familio ne
akceptis la bolŝevistan revolucion kaj
forveturis al Ukrainio, kie Hohlov ekser-
vis en la “blanka” armeo. En la armeo
Hohlov ekhavis tifon kaj estis savita de
la Brita Ruĝa Kruco.

Li preferis ne reveni al Moskvo kaj
elmigris, unue al Malto, kaj poste al
Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slove-
noj. Post sep jaroj en Bakar kaj Zagrebo
(tie li laboris en Adriatika Banko) en
1928 li revenis en Moskvon, dum lia
edzino kun ilia filo Juliusz restis en Var-
sovio. En Moskvo li laboris kiel ekono-
miisto en diversaj entreprenoj. En 1930
li denove edziĝis, kaj en 1931 naskiĝis
lia dua filo Leonid. Post la atako de la
nazia Germanio, en 1941 Hohlov kun
aviadiluzino en kiu li laboris veturis al
Taŝkento kun sia familio. El Taŝkento li
revenis Moskvon en 1944 kun rompita
sano. En 1952, kiam li laboris kiel estro
de planfako en la bierfabriko Ostankino,
li havis apopleksion kaj post kelkaj
monatoj, la 26an de februaro 1953 lia
vivo finiĝis.

Hohlov eklernis Esperanton kiel 14-
jarulo en 1905. La plej unua kajero de *La
Ondo de Esperanto*, aperinta en februaro
1909, mencias lin kiel aktivan propa-
gandiston de Esperanto en la poŝtofi-
ejo. En Moskvo li okupiĝis pri diversaj
movadaj taskoj, precipe pri informado
kaj instru-ado, sed pli gravas, ke en apri-
lo 1910, kiam li havis 19 jarojn, *La Ondo
de Esperanto* aperigis lian poemon *En
tombejo*. La poemo, datita je la 17a de
februaro 1910, estas trosentimentala 44-
versa rakonto pri vizito de junulo al la
tombo de la amatino.

En 1921 Hohlov kaj Duŝan Maruzzi
kunfondis en Zagrebo la gazeton *La
Provo* (poste *Konkordo*), kiu ĉesis aperi
en 1928, kiam Hohlov forlasis Zagreb-
on. En 1922 Maruzzi fondis eldonejon
Sudslava Esperanto-Servo, al kiu
Hohlov tuj kontribuis per sia traduko de
Krucumo de Aleksandr Drozdov (same
kiel Hohlov, Drozdov servis en la blanka



armeo, elmigris, kaj en 1923 revenis al
Ruslando). Ekde 1922 Hohlov kunlabo-
ris kun *Literatura Mondo*, kie aperis liaj
poemoj, noveloj originalaj kaj traduk-
itaj, ankaŭ artikoloj. Kutime li uzis la
pseŭdonimon “Skito”.

La 5an de januaro 1924 en Zagrebo
estis prezentita lia unuakta komedio *La
Morto de la Delegito de U.E.A.*, eldonita
libroforme en 1924 kiel la unua volumo
de la “Biblioteko de la Konkordo” en
Zagrebo. En 1924 aperis en Lepsiko lia
traduko de la *Orientaj fabeloj* de Vlas
Doroŝeviĉ. Post du jaroj sekvis la unu-
akta vodevilo *Granda bruvo pro nenio* de
D. Dobin, kiel la 3a volumo de la
“Biblioteko de Konkordo”. En 1928
aperis la teatraĵo *Morto de Danton* de
Aleksej N. Tolstoj kaj la originala poem-
aro *La Tajdo*, eldonitaj de *Heroldo de
Esperanto* en Horrem bei Köln.

En Moskvo Hohlov daŭrigis sian
esperantistan agadon, interalie, kiel
gvidanto de literatura sekcio en la lingva
komisiono de SEU, sekretario de la
lingva komisiono, kaj gvidanto de la
Esperanto-sekcio de la Amikeca Societo
VOKS (poste SSOD). Li multe tradukis,
sed estas sciata nur unu originala vers-
aĵo, verkita de li post la reveno la 26an
de majo 1928:

Viburno

*Ĉe serpentuma rivera turno,
ombrante ŝtonojn de moska put',
en la umbela ornam' viburno
sunumas branĉojn sur verda krut'.*

*Mi ne forgesis — mi ĝin rekonas,
la kamaradon de l' fora jun';
en la animo revide sonas
la pasinteco tra l' muta nun.*

*Ĉu ne hieraŭ la varman manon
glacie brogis la akva skvam',
kaj lipoj trinkis la mirĉampanon
sub la tintado de l' guta gam'?*

*Ĉu ne hieraŭ la koro saltis
pro la senbrida plensanga puŝ',
ĉu ne hieraŭ apenaŭ haltis
en kantebrio la arda buŝ'?*

*Kun la freŝeco de la hieraŭ
tre zorge gardis la frida kor'
ĉi tiun puton ĉe la rivero
kaj la viburnon en la memor',*

*por ĉe l' revido dolore sveni
en skua ondo de la pasint',
kaj, sveniĝante, rezigne beni
la gutoplendojn de l' plaŭda tint'.*

Kune kun Nikolaj Nekrasov li traduk-
is en 1931 el la rusa la studon de Ernest
Drezen *Historio de la Mondolingvo*. Ĝi
aperis en Lepsiko same kiel *Per voĉo
plena* de Majakovskij (1930) kaj *La
unua soveta blumingo* de Staĥanov
(1932). Post 1933 li malaktiviĝis; nur en
Argenta duopo (1937) aperis lia artikolo
pri *Preter la vivo* de Julio Baghy. Lia
lasta traduko, kiun Bonifatio Tornado
datas je 1948, estis *Himno de la demok-
ratia junularo* de Lev Oŝanin.

Inter la verkoj de Hohlov elstaras lia
poemaro *La tajdo* (1928), kiu entenas 38
poemojn kaj la moton el *Art Poétique* de
Verlain: “De la musique, avant toute
chose...”, kiun Waringhien tradukis:
“Muzikon antaŭ ĉio alia!” Kaj laŭ atesto
de Ivo Rotkviĉ (1965), Hohlov fajfis
melodiojn, kaj sub la sonoj aperis rimoj
kaj versoj. Tiel aperis perloj de la Espe-
ranta liriko, ekzemple, *La luna ebrio*

*Jen — ĝi brilas, mia luno,
Virgomaska amlucerno,
Nuda mammo el latuno,
Iritilo de l' eterno...*

La temaro de *La tajdo* estas varia;
apud amversaĵoj estas politika liriko,
kiel 1905 kaj *Eŭropo*, nostalgia *Mia
Patrujo*, ŝerca *Maltrafa pafjo*, filozofia
Prolegomeno...

Ni finu per vortoj de Tárkony:

Granda promeso kaj multa plenum-
iĝo estas tiu ĉi volumeto. La aŭtoro sen-
tas la lingvon en la pulso, perfekte estras
la formon, liaj ritmoj estas freŝaj kaj
sane pulsantaj, liaj rimoj estas novaj kaj
ofte surprizaj. Li havas freŝajn ekpen-
sojn, plaĉajn metaforojn. Kiu ne sentus
agrablan eksciton, kiam li parolas pri
“mentodora kaj karese dolĉa vento”,
kiam en sia belega poemfresko “Duelo”
li malkovras en la skermanta virino
“mikson el tigro kaj mimoz”. (*De paĝo
al paĝo*. Budapeŝt, 1932, p. 56)

Aleksander Korĵenkov

Ĝeneva triopo

Beletra kolekto de ĝenevaj aŭtoroj.
— Genève: Esperanto-Grupo *La Stelo*, 2011. — 125 paĝoj.


“Antaŭ kelkaj jaroj la komitato de [la Ĝeneva Esperanto-Grupo] *La Stelo* ekhavis la ideon eldoni kelkajn verkojn de konataj ĝenevaj Esperanto-aŭtoroj kiel Claude Piron, Madeleine Stakian-Vuille kaj Henri Vatré. Ĉi tiuj tri esperantistoj ne nur vigle agadis por la Esperanto-movado, sed ankaŭ funkciis kiel ĝiaj literaturaj vizitkartoj, do ili estas kvazaŭ neforgeseblaj steluloj de la ĝeneva Esperanto-grupo *La Stelo*, kiujn indas omaĝi”, — tekstas la dorskovrilo de la libreto. Tute prave.

Madeleine Stakian-Vuille (1910–2004) komencis lerni Esperanton en 1918, en 1930 fondis esperantistan koruson, poste laboris en UEA, ekde 1957 estris la menciitan grupon *La Stelo* kaj ĝisvivis la jaron 2004. Imagu: 85 jarojn en Esperanto!.. Ŝi verkis, sub stranga pseŭdonimo Mad Mevo, klasikstilajn versaĵojn. Plejparto de ili, el 1930-aj jaroj, nun aspektas sufiĉe arkaike, ankaŭ la temoj (pri tutmonda unueco-frateco, amo al la verda stelo ktp.) banaliĝis, tamen kelkaj ankaŭ nun sonas freŝe kaj ĉarme:

*Naskiĝu, burĝonaj floretoj,
Vin benu la roso fekunda;
Ŝiriĝu la verdaj korsetoj
Ŝvelantaj sub pluvo abunda.*
(p. 34)

Ĉeestas ankaŭ ŝia interesa artikolo pri popolaj kantoj (presita en la revuo *Esperanto*, 1935).

Henri Vatré, pseŭdonime ankaŭ Henri Baupierre (1908–1998). Spertaj literaturŝatantoj aprezas lian pastiĉaron *Specimene* (1962), “kies stilparodioj pri



kvardeko (!) da Esperanto-verkistoj pruvigis la jaman maturecon de literaturo kun tiom da distingeble propraj voĉoj” (el Vikipedio). Nunaj legantoj, bedaŭrinde, ne tiom bone konas liajn verkojn; se brilajn novelojn *Malkovro* kaj *La kimra Biblio* oni povas legi interrete, liajn poeziaĵojn ĝis nun mi ne konis. Fakte, ili “surfaciĝis antaŭ nelonge el subtegmenteja angulo, post preskaŭ duona jarcento. Ene de tiu poemaro fluge kaj flue ruliĝas la vortoj por doni voĉon al emociplena kaŝita amo”, — skribas anonima libro-kompilinto. Alipaĝe pri la samo: “temas pri unika kolekto de pasiaj amokrioj el la 1960aj jaroj direktitaj al unu bela virino kun temperamento slava-itala, kiu siatempe ravis la esperantistojn per teatro kaj distro (ĉu vi konjektas, pri kiu temas? — VMel). Dum la adorantino evidente ne konfirmis lian ardon, Vatré profunde intimiĝis kun la lingvo Esperanto, kreante specialajn deliciaĵojn”. Leĝera stilo, liberaj, “blankaj” versoj — ne laŭ mia persona gusto,

Nova lingvosciencia revuo



Lingvistik' (ISSN 1986-4450) estas internacia revuo pri lingvoscienco, fondita en 2011 de aro da fakuloj de malsama deveno, danke al la apogo de la Internacia Universitato de Karlovo (Bulgarujo). Ĝia specialaĵo estas, ke ĝi celas aperigi sciencajn artikolojn pri lingvistiko en la gepatra lingvo de la aŭtoro kaj en Esperanto: tiel ĝi kontribuas al la uzo de “malgrandaj” lingvoj por sciencaj celoj kaj al tutmonda legeblo de la artikoloj en la neŭtrala lingvo Esperanto. La unua numero de la revuo aperos fine de la jaro 2012. La limdato por artikoloj estas

la 30a de septembro 2012.

Estu inter la unuaj kontribuantoj per lingvosciencia artikolo en via lingvo!

Pliaj informoj ĉe: www.lingvistik.weebly.com

Roberto Pigro

Kulturo

sed ŝatantoj certe troviĝos, nun tia formo estas laŭmoda, kvankam Vatré verkis tion antaŭ multaj jaroj. Nur unu kurta versaĵo estas klasike rimita, aliaj du — rimitaj neklasike, kaj krome ĉeestas proza miniaturo *Portreto en la spegulo* — lernu, kiel oni povas priskribi virinajn trajtojn, eble vi, samkiel mi, tuj rememoros la praantikvan *Kanton de kantoj*...

*La blua luno
traĵaluzie
rivelos al vi
seniluzie
la nudan floron
de mia juno.
[...]
Sur mia brusto
rebrilas
du kandelingo
el pala kupro,
lumigu ilin
per via flamo,
mi estu Eva
kaj vi Adamo,
min faru reva
kaj via Damo.*
(p. 91-92)

Claude Piron — la plej juna el la triopo, apartenanta al la sekva generacio, sed ankaŭ li, bedaŭrinde, jam forpasinta (1931–2008). Ne necesas klarigoj pri li, ĉiu ni legis liajn verkojn — aventurojn de malaperinta Gerda, Ĉu-detektivaĵojn, aŭ ion pli seriozan psikologie. Ĉi-libre troviĝas kelkaj liaj poemetoj — la plej atentinda, miaopinie, estas *La sufero de l' aliaj*, premiita en Belartaj Konkursoj de UEA en 1956. Kaj krome — komedia teatraĵeto *La ezoko*, aparte atentinda por ruslandanoj, ĉar ĝi priskribas la rusan vivon antaŭ unu jarcento. Ne temas pri “majesta oksikok-arbo”, tamen troveblas amuzaj fuŝetoj rimarkeblaj nur por atentema ruso. La tuta scenajaĵeto estas tre sprita (nu, Piron neniam verkis malspritaĵojn...) kaj riĉa je sukplenaj sakraj esprimoj en preskaŭ ĉiu repliko. Mi ne citos ilin, ĉar ĉiuj estas brilaj. Ĝeneralaĵojn insultojn kun variaj komparoj el animala mondo la protagonisto povas toleri, sed kiam sonas insulto specife Esperanta... Do, legu kaj vidu mem, ankaŭ riĉigu vian lingvaĵon...

La libreto estas bona enhance kaj bela aspekte. Bedaŭrinde troviĝas mistajpoj, iuj eĉ ĝenas la komprenon (“Ni” anstataŭ “Ne” sur p. 26). Nu, eĉ Suno havas makulojn...

Valentin Melnikov

19

Publika Esperanta biblioteko en Bjalistoko

Kiam en 2007 en Jokohamo la urbestro de Bjalistoko promesis krei en la urbo Centron de Esperanto, ĉiuj kredis, ke li realigos per la komunuma mono la revon de esperantistoj el la jaro 1987a. Tio ne eblis. En la rekonstruita malnova domo ĉe la iama reĝa ŝoseo Warszawska dum la 94a UK estis inaŭgurita la nova komunuma kulturcentro Ludoviko Zamenhof, kiu okupiĝas pri multkultureco de Bjalistoko. Esperanto estas nur malgranda peco de ĝia interesosfero.

Mirinda kunlaboro kiu, danke interalie al Lidia Ligeża kaj Tomasz Chmielik, komenciĝis antaŭ la Bjalistoka UK inter la Esperanta mondo kaj la Podlaĥia Libraro, donis rezultojn, kiam en la Urbodomo oni cerbumis ĉu eblas en la nova situacio organizi publikan Esperantan bibliotekon kaj certigi monon por ĝiaj elspezoj. La statuto de la Podlaĥia Libraro estis modifita per la aldono al ĝi de la Esperanto-kolekto.

Jan Leończuk — la direktoro de la centjara biblioteko, la plej granda en la regiono — mem poeto, evidentiĝis bonega partnero por esperantistoj. Li decidis malfermi la filion №14 kun Esperantaj libroj kaj gazetoj. La urbestro certigis, ke en la centro Zamenhof oni malmultekoste pruntedonos ĉambron por la venonta biblioteko. Bonega solvo! Kiam venas eksterlandanoj ili tuj estas direktitaj al la Esperanto-Libraro por komenci la aventuron kun la Zamenhofcentro. Mi rakontadas la historion, informante pri ekzistantaj agadoj kaj planoj.

Septembre 2011 mi partoprenis en Herzberg konferencon pri Esperanto-bibliotekoj, dum kiu prof. Detlef Blanke kaj aliaj raportis pri unuecigo de Esperantaj katalogoj, por ke en la tempo de retaj katalogoj “on-line” esperantistoj el la tuta mondo povu kontroli la enhavojn de kolektoj. Malnovaj privataj kolektoj ofte estis katalogitaj laŭ metodoj pripensitaj antaŭ jaroj de iliaj posedantoj, kaj nun ili estas atingeblaj kaj komprenataj nur de la aŭtoroj mem. La posedantoj havas nek emon nek tempon ŝanĝi tion. Librojn oni pruntedonas malofte kaj nur al fidindaj homoj, kiuj garantias redonon. La okuloj de la posedantoj daŭre ĝojas spektante bretarojn plenajn de libroj eĉ se polvo kovras ilin pli kaj pli...

Apartenante al granda provinca biblioteko, la malgranda Esperanto-Libraro uzas ĉiujn rimedojn atingeblajn por publikaj bibliotekoj en Pollando. La universala komputila programo MAK permesas al ĉiu leganto trovi en la ĉefa katalogo de la Podlaĥia Libraro la kolekton “Esperantiana”. Tie troviĝas ĉiu Esperanto-libro priskribita laŭ la universalaj kondiĉoj de la programo. Parton de la Podlaĥia Libraro kreas Podlaĥia Cifereca Biblioteko. 127 malnovaj libroj, kiuj troviĝas en la Esperanto-Libraro, estis ĵus kontrolataj kaj, se estos jure permesite, ni komencos ciferecigi ilin.

Panoramo de la Bjalistoka Esperanta Biblioteko



99,9% de la kolekto estas donacoj. Ne eblas rakonti pri ĉiuj donacintoj, sed pri kelkaj mi rakontas. Ewa Bondar, longtempa instruistino pri Esperanto, donacis al ni sian tutan kolekton. Post la morto de sia plenkreska filino malsana je kancero, la patrino, likvidante ŝian loĝejon, serĉis novajn uzantojn de Esperanto-libroj kaj trovis la Esperanto-Libraron. Nia Finnlanda gasto sinjorino Synnöve Mynttinen dum la 11aj Bjalistokaj Zamenhoftagoj demandis pri speco de libroj mankantaj en nia biblioteko, kaj poste pere de UEA sendis al ni 80 librojn por infanoj kaj junularo. Kiam ni renkontiĝis en Kopenhago, kaj mi varme dankegis pro la ricevitaj libroj, ŝi ŝajnis konfuzita kaj tuj proponis, ke ni ankoraŭ serĉu je ŝia kosto ion konvenan en la Libroservo de UEA. Kaj ni aĉetis aldona dek novajn librojn... Berlinanoj sendis al ni eĉ dufoje Johanon Pachter kun la aŭtomobilo plena de libroj kaj gazetoj. Lastatempe li alportis, interalie, ege valorajn jarkolektojn de *Pola Esperantisto* el la jaroj 1907 kaj 1908 — la unuajn numerojn eldonitajn ankoraŭ en la pola lingvo en Lvovo.

Niaj donacintoj entuziasme donacis al ni siajn amatajn librojn, por ke ni povu malfermi la bibliotekon, kaj baldaŭ pluraĵoj titoloj ripetiĝis. Kion fari por ŝpari lokon por venontaj novaĵoj? La ĉambro havas nur 22 m²! Ĉiumarde en la biblioteko helpas volontulino Zsófia Pataki el Hungario, kun kiu ni komune kreis plenan liston de Esperanto-gazetoj por havi informon por serĉantoj kaj por sciigi nin mem, kio mankas por kompletigi jarkolektojn. Laŭ nia interkonsento, pluraj duoblaj ekzempleroj de Esperanto-libroj baldaŭ estos transportataj al Szeged (Hungario), kie ili trovos novan lokon en la universitata libraro. Post la fino de la volontulado en Bjalistoko, Zsófia revenos tien, kie ŝi gvidos ĉe la Universitato Esperanto-kurson por studentoj.

Legante en la februara *Ondo* artikolon pri la libroj eldonitaj en 2011 mi havis impreson, ke Bjalistoko iĝis grava centro de eldonado. En 2011 ni sukcesis eldoni sep librojn, kaj ĉi-jare ni planas eldoni pliajn kvin volumojn, inkluzive de poemaro de la Nobel-premiita poetino Wisława Szymborska, kiu mortis la 1an de februaro 2012.

Dum 2011 vizitis la Esperanto-bibliotekon 2959 personoj; ili prunteprenis 1203 librojn. Ni havas 80 konstantajn legantojn, sed ofte agrable surprizas nin homoj, kiuj serĉas materialon pri konkreta problemo. Mi estis feliĉa helpante al du germanoj trovi materialojn por iliaj diplomlaboroj pri interlingvistiko. Kelkaj studentoj de la Bjalistoka Universitato serĉis ĉe ni informojn por prelegoj kaj seminarioj. Gimnazioj venas por lerni la teorion de Esperanto partoprenante jam la kvaran historian-socian konkurson *Babelturo*, kunorganizitan de la Bjalistoka Esperanto-Societo kaj la 1a Liceo en Bjalistoko. Niaj instruistoj trovas interesajn materialojn por instrui infanojn kaj aliajn kursanojn.

Ni propagandas Esperanton, montrante librojn al ekskursanoj, vizitantaj Zamenhofcentron, kaj disdonante flugfoliojn. Somere, kiam en BES finiĝas kursoj, ni renkontiĝas merkrede en la biblioteko. Okazas prelegoj en la pola kaj Esperanta lingvoj pri verkistoj ligitaj al Esperanto pere de siaj verkoj. Niaj gastoj povas surloke ludi la tabulan ludon pri Esperanto en Bjalistoko, aŭskulti Esperantajn kantojn, spekti Esperantajn filmojn aŭ serĉi ion en la reto uzante komputilon. Gravas, ke la Esperanto-Libraro vivas, estas atingebla por ĉiuj kaj utila ne nur en Bjalistoko.

Ela Karczewska

Heroldo, ĉu paŭzo aŭ ĉeso?



La 14an de marto en la retejo *Libera Folio* aperis artikolo, kiu anoncis:

«Ŝajne ĉesis aperi *Heroldo de Esperanto*, kiu iam estis unu el la ĉefaj gazetoj de la Esperanto-movado. La lasta numero laŭ la regula vicordo estas numero 10 por la pasinta jaro. Poste sekvis truo de tri numeroj, ĉar la sekva aperinta numero estis numero 14 por 2011. La lastaj tri pasintjaraj numeroj ne aperis, same ne aperis iu ajn numero de la jaro 2012, kiuj devus jam esti tri aŭ kvar».

Laŭ *Libera Folio*, la kialoj de la eventuale provizora halto de *Heroldo* sendube estas la manko de redaktoro (pro tio, ke la elektita redaktoro Etel Zavadlav faris nenion, oni elektis anstataŭ ŝi Anna Bartek) kaj forfalo de pluraj konstantaj kunlaborantoj.

La *Ondo de Esperanto* demandis al la redakcio de *Heroldo* pri la nuna situacio kaj ricevis jenan respondon de Kooperativo de Literatura Foiro, kiu dum la lastaj 15 jaroj eldonas *Heroldon*:

«Se HdE ne plu aperus, la eldonejo ne enlistigus ĝin inter la aboneblaj periodaĵoj. Ni ne ŝatas perdiĝi tempon kaj prestiĝon al niaj kunlaborantoj. Pri la malfruo probable aperos baldaŭ gazetara komunikilo».

Je la redaktotino de ĉi tiu *Ondo* gazetara komunikilo pri *Heroldo* ankoraŭ ne aperis. Ĝis nun nin atingis la numerojn 1–10 kaj 14 por la 2011a jaro, sed neniu numero ĉi-jara.

AIKO

Literatura Konkurso Hristo Gorov – Hrima

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson, kiu okazos ĉiun trian jaron. En la konkurso povos partopreni verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso havos la jenajn branĉojn: poezio, prozo, artikolo.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per du poemoj, originale verkita en Esperanto.

La noveloj devas esti ĝis 4-paĝaj kaj ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu novelo, originale verkita en Esperanto.

La poemoj, noveloj kaj la artikoloj devas esti komputile kompostitaj.

La konkurso ne havas apartan temon.

La artikoloj estu dediĉitaj al signifa Esperanta aranĝo.

La gajnintoj ricevos grandajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 1a de septembro 2012 rete (modest@abv.bg) aŭ poŝte al Georgi Mihalkov, Sofio — 1229, “Nadejda” V, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

Ricevitaj libroj

Beletra kolekto de ĝenevaj aŭtoroj. — Genève: Esperanto-Grupo *La Stelo*, 2011. — 125 p. — (Recenzoekzemplero).

Korženkov, Alexander. *Život Zamenhofa: Život, dielo a myšlienky autora esperanta / Slovenský preklad z esperanta a angličtiny Pavol Petřík; Úvod Peter Baláž, Humphrey Tonkin.* — Partizánske: Espero, 2011. — 104 p., il.; 500 ekz. — (Donaco de *Espero*).

Zamenhof Festo 2011 kun Koreaj samideanoj / Redaktis Reza Kheirkhah. — [Pingtung]: Reza Kreirkhah, 2011. — 32 p., il. — (Donaco de Reza Kheirkhah).

Ricevitaj gazetoj

Bulteno de Esperantista Klubo en Praha, 2011/3; Esperanto, 2012/2; Esperanta Finnlando, 2012/1; Esperanto Aktualaj, 2012/1; Esperanto aktuelaj, 2011/6, 2012/1; Esperanto en Azio, 2012/74; Esperanto en Marche, 2012/1; Formoza Folio, 2012/14; Frateco, 2012/95; Kontakto, 2011/6; La Ondo de Esperanto, 2012/3; La Revuo Orienta, 2011/12, 2012/1; La Sago, 2011/80, 2012/81; Monato, 2012/2,3; Norvega Esperantisto, 2012/1; REGo, 2012/1; Scottish Esperanto Bulletin, 2012/1.

Literatura Foiro, 2011, №254

Omaĝe al Steve Jobs, la revuo publikigas lian enorme saĝan oratoradon en la Stanford-universitato, 2005. La finaj frazoj, en traduko de Ljubomir Trifončovski kaj Barbara Ilieva nialingven, alvokas tute same kiel en la laste aperinta numero de *The Whole Earth Catalog* de Stewan Brand antaŭ preskaŭ 40 jaroj kaj ripetite akcentitaj fine de Steve Jobs: “Restu voremaj! Restu malprudentaj!”

La decembra LF 254 tute ne malrevigas siajn fidelajn legantojn. Jen la uvertura poemo de Gabriel Mora i Arana inspirita de poemo de Josep Maria López-Picó, sialoke inspirita de la fama pentraĵo *La source* de Jean-Auguste-Dominique Ingres; jen la (preskaŭ-)prozaĵo (ĉu ne temas pri poemo?) de Barry Friedman; jen elektite el la poezio de Czesław Miłosz en tradukoj de Kris Long, Tyburcjusz Tyblewski kaj Irena Missiuro (por la aperonta nova *Pola Antologio* sub la zorgo de Tomasz Chmielik). Leif Nordenstorm ek-eseas pri la Biblio: ne nur kiel Sankta Skribo sed ankaŭ kiel literaturo.

Kio pli? Francisko Degoul pri la kontribuo de Ludoviko Zamenhof al la Kongreso de Rasoj antaŭ cent jaroj; Armando Zecchin postsimpozio pri la Homaranismo; nova projekto de Radosław Nowakowski kun specimeno el ĝi; Zeki Ergas (tradukita de Donald Broadribb) pri la lingvaj rajtoj de la mapuceanoj; Carlo Minnaja pri la centkvindeka datreveno de la unueco de Italio.

Mariana Evlogieva recenzas la diskon *Revado* de Réverie. Giorgio Silber levas la kurtenon de Melpomena: krokize pri la lasta spektaklo de Moni Ovadia (la ĉefa hebrea aktoro-reĝisoro en Italio) pri ciganoj kaj judoj kaj aliaj diasporoj.

HeKO

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la februaraĵoj *Proverboj Trovendaj 4* venis 21 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Claude Glady (Belgio), Brian Bishop, Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Jindřich Tomášek (Ĉeĥio), Erkki Kempainen (Finnlando), Jackie Huberdeau, Anne Jausions, Jean-Luc Tortel (Francio), Christiane Altrogge, Hans-Burkhard Dietterle, Edeltraut Henning (Germanio), Marianna Boharewicz, Dorota Burchardt, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Vasán Zang (Portugalujo), Svetlana Konjašova, Vladimir Romanov, Oleg Vasiljev, Vladimir Vyĉegjanin (Ruslando).

La solvo estas: Unu hirundo printempon ne alportas. Ĉiu komenco estas malfacila. Loto donis la libropremion al *Claude Glady* (Belgo), kiun ni gratulas.

Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampojn per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en la kvadratoj 3×3 la ciferoj ne ripetiĝo. Viaj respondoj venu al la redakcio antaŭ la 15a de junio 2012.

Komputile kompilis **Aleksej Korĵenkov**

2			1	4		8	7
1							
			6				
3			4	2			1
		9				7	
7			5	6			4
			4				
							2
4	3		9	1			5

Juda humuro

Ne zorgu, ili trovos nin!

Abrahamo kaj Ester estas juda paro el Novjorko. Ili faras vojaĝon al Aŭstralio por festi la 40-an datrevenon de sia geedziĝo. Dum la flugo super la oceano okazas paneo ĉe la motoro de ilia aeroplano. La piloto sukcese alterigis la aviadilon sur iu malproksima insulo.

La pasaĝeroj estas ŝokitaj kaj tre embarasitaj. Post unu horo diras Abrahamo al sia edzino: “Ester, ĉu ni pagis al la sinagoga funkciulo por la menditaj sidlokoj?”

Ester: “Ne, mi ne havis la tempon por fari tion”.

Abrahamo: “Kaj la mondonacon al la juda helpfonduso?”

Ester (*honteme*): “Oh, Dio! Mi simple forgesis aranĝi la pagon”.

Abrahamo: “Kaj la mondonacon al la juda religia seminario, ĉu vi sendis?”

Ester: “Mi preparis la koverton sed ankoraŭ ne enpoŝtigis ĝin”.

Abrahamo (*ĝojplene kaj krie*): “Ho, mi ĝojegas! Ni estas savitaj! Ne zorgu, ili serĉos nin kaj fine trovos nin!”

El la kolekto de **Josef Ŝemer**

Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Incesto kaj poligamio, aŭ: familio kun refleksivo

La patrino de Linka naskis du gefilojn. La filon ŝi neniam amis. Eble ĉar li tro similis al sia edzo, kiun fakte ŝi ĉiam malamis. Ŝi edziniĝis al li, ĉar la gepatroj preskaŭ devigis ŝin... (Júlia Sigmund. *Nomoj kaj sortoj*. Cluj-Napoca: Exit, 2011, p. 49; rimarkis Sten Johansson)

Fosigu nia sulko, aŭ: Am-leksiko en Meksiko

Fondigis novan esperantan asocion en meksika lando, laŭ rezulto de entuziama kunlaborado de Guillermo Macias, Vicente Valdés kaj de aliaj meksikaj kaj eksterlandaj esperantistoj... (Fondigo de nova esperanto-asocio en Meksiko // *Meksika Esperanto-Info*, 2010, №1, p. 1; xa.yimg.com/kq/groups/18310308/254801082/name/me-informo-2010-1.pdf)

Hugoŝima

TOYOSIMA Yosio... (1890-1955) estis japana novelisto, literaturisto pri la franca lingvo, kaj eljapanigis el la franca la romanon “La Mizeruloj” de Viktor Hugo. (Komenentario al Mirinda Ĉapelo de TOYOSIMA Yosio, vastalto.com/librejo/MirChap/MirChap.html)

Mono fluas preter kaso

Ne ekzistas kasitaj elspezoj. (Ferenc Harnyos, 14 feb 2012, yahoo-grupo esper-inform, mesaĝo 5121)

Muzoj kaj manioj

La Varsovia E-klubo lige kun la nunjara Tago de la Gepatra Lingvo ligis kunlaboron kun grupo de junaj muzulmanioj. (Barbara Pietrzak, 10 mar 2011, yahoo-grupo landagado, mesaĝo 15636)

Serĉu la kukolan ovon

La [UEA]-Jestraro konsistas [krom d-ro Probal Dasgupta] el ges-roj Loes Demmendaal, Maritza Gutierrez, Stefano Keller, Claude Nourmont, Barbara Pietrzak, Amri Wandel. Unu el ili havas la esperantan civitanecon. (La UEA-diarkio firmigas sian gvidadon // HeKo 445 1-A, 17 jul 2010, esperantio.net/index.php?id=1371)

Stela lando

kiu diras, ke en Astrujo ne okazas io? (Renato Corsetti, 9 jan 2012, yahoo-grupo informado, mesaĝo 2243)

Beletra kokinejo

La E-Kluko Jules Verne estas klubo por esperantistaj homoj kiuj ŝatas beletron, kinon, teatron, aliajn artajn manifestaciojn koncernajn al literaturo... (La EKJV serĉas kunlaborantojn [tiele], klubojulesverne.wordpress.com)

Truu konon, tradu kilon

Temas pri teksto analizante la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la kreado de aŭtomataj tradukiloj per Apertium, rimedaro por kontrui aŭtomataj tradukilojn. (Salutvorto de la redaktoro // *Teleskopo*, 2011, 3a eldono)

Plukis **István Ertl**

Ni serĉas kunlaborantojn por *Mozaiko*. Se vi ŝatas verki krucvortenigmojn, ŝaradojn kaj aliajn enigmojn, sendu ilin al nia redakcia adreso.

Donacoj

Savi la vivon (7)

Donacoj faritaj ekde 19 feb 2012 ĝis 17 mar 2012

Anonime (Germanio)	200,00
Anonime (Germanio)	20,00
Anonime, diversaj (Germanio)	125,00
Hans Joachim Böttcher (Germanio)	100,00
Josef Fischer (Germanio)	300,00
Rudolf Fischer (Germanio)	300,00
Armin Kadow (Germanio)	200,00
Gunthild Meyer (Germanio)	anonima sumo
Heinz-Wilhelm Sprick (Germanio)	50,00
Entute ekde 19 feb 2012 ĝis 17 mar 2012	1.295,00
Je la 18a de februaro 2012	29.632,00
Je la stato de la 16a de marto 2012.	30.927,00

Libromendo

Kelkaj personoj el Germanio decidis helpi al Halina alimaniere. Iliaj donacoj estis uzitaj por atangi grandan libromendon ĉe la eldonejo *Sezonoj* kaj tiel disponigi tre altan sumon por la savo de Halina. Ĉi tiu projekto estas grava, ankaŭ ĉar la libroj estas parte disdonotaj al bibliotekoj kaj individuaj Esperanto-parolantoj en evolu-landoj.

Wolfgang Bohr (Germanio)	50,00
Anonime (Germanio)	1200,00
Anonime, 4 diversaj (Germanio)	6850,00
Entute je la 17a de marto 2012	8.100,00

Abonhela fonduso 2010

Ĉi tie estas registritaj donacoj, uzitaj por helpabonoj por la jaro 2010.

Tiina Oittinen (Finlando)	18,00
Gerd Bernhard (Germanio)	12,00
Munkena Esperanto-klubo (Germanio)	38,00
Osmo Buller (Nederlando)	82,00
Douglas Draper (Norvegio)	50,00
Jos. R. Koch (Svislando) 43,00 CHF	28,90
István Ertl (Luksemburgo) 70,00 PLN	17,50
Sergej Bronov (Ruslando) 5067,00 RUR	119,20
Entute.	365,60

Danke al la Abonhela fonduso 17 esperantistoj el 11 landoj en 2010 ricevadis *La Ondon*.

Abonhela fonduso 2011

Ĉi tie estas registritaj donacoj, uzitaj por helpabonoj por la jaro 2011.

Alex Sousa Santos (Brazilo)	120,00
Tiina Oittinen (Finlando)	38,00
Marc Bavant (Francio)	38,00
Gerd Bernhard (Germanio)	12,00
Munkena Esperanto-klubo (Germanio)	38,00
Lovissa Óskardóttir (Islando)	38,00
István Ertl (Luksemburgo)	20,00
Osmo Buller (Nederlando)	42,00
Douglas Draper (Norvegio)	50,00
Bengt Nordlöf (Svedio)	38,00
Jos. R. Koch (Svislando) 13,00 CHF	8,70
Sergej Bronov (Ruslando) 4042 RUR	101,05
Entute.	543,75

Danke al la Abonhela fonduso 27 esperantistoj el 15 landoj en 2011 ricevadis *La Ondon* papere kaj rete.

Ĉiuj sumoj estas en eŭroj.

Dankon pro la donacoj!



Kroatio. La Esperanto-Maskerada Kompanio *Paždoć* (Tohu-vabohuo) ankaŭ ĉi-jare partoprenis en la tradicia karnavala parado en Rijeka (p. 5), montrante al centmilpersona spektantaro sian ĉaron kun veturilo, ornamita per Esperanto-flago. (*Vjekoslav Morankić / Krešimir Jerić*)



Burkino. En la vilaĝo Saint-Jean, je 300 km nordokcidente de la ĉefurbo Ŭagadugo, estas konstruata universala amikejo Aurovillage ligita kun Aŭrourobo (Auroville) en Barato. Esperantistoj el Togolando kaj Francio aranĝis tie lingvan kurseton kaj disdonis lernomaterialon kaj aliajn donacojn. (*Adjé Adjévi*)



Nepalo. La ĉefa konkludo de la unua Sud-Azia Seminario, okazinta en Katmanduo (p. 7) kun partoprenantoj el Nepalo, Barato kaj Pakistano, estis, ke Esperanto bone taŭgas kiel pontlingvo, kaj nun sud-aziaj esperantistoj eklaboras, por ke Esperanto estu la pontlingvo inter ĉiuj sudazianoj. (*Bharat Ghimire*)

SES 2012

Somera Esperanto-Studado

21.-29.07.2012, Nitra, Slovakio

Kvina renkontiĝo de lernu! uzantoj

Kio atendas vin?:

elstaraj instruistoj, agrabla loko, bonega etoso, ekskursoj, sportumado, naĝado, koncertoj, prelegoj, diskutoj, filmoj, vin-gustumado...

Specialaj ĉi-fojaj programoj:

ILEI+E@I seminario „Flugiloj de malfacila vento“
Konkursoj kun valoraj premioj, KER-ekzamenoj

Pli da informoj: www.lernu.net/ses aŭ ses@lernu.net



Venu al la
Esperantista Kulturdomo

Grésillon

www.gresillon.org
M.C.E., kastelo Grésillon, 49150 BAUGÉ, Francujo

Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK

Temo: Sciencfikcio kaj robotoj

14–20 Julio 2012 en SVITAVY, Ĉeĥio



Prelegos i.a.

Mikaelo Bronŝtejn, István Nemere, Liven Dek, ...

Konferencjo: Esperanto-muzeo
(Ottendorfer-Domo, vidu la bildon) el 1892

Riĉaj kultura kaj turisma programoj,
kurso de Esperanto por komencintoj



Pli da informoj kaj aliĝiloj: www.kava-pech.cz/iek aŭ chrdle@kava-pech.cz